

EL POPOLA CINIO

中國新道

4

1980



Ludo de Naciaj Muzikiloj

de YAN JIN

Solo de ĝeng-o






Solo de *juan-o*



Kunludo de *erhu-oj*

En aŭtuna nokto lampoj lumis en la Kultura Domo de Laboristoj de Wuxi, kaj tie iris diversaj kulturaj aktivadoj. El iu salono aŭdiĝis jen agrablaj sonoj de ĉina antikva plukmuzikilo *ĝeng-o*, jen lirikaj melodioj de bivo, jen gajaj sonoj de surnao . . . La ludado estis plenumita de la amatora orkestro de junaj laboristoj kaj estis akceptata kun laŭdoj.

Solo de *ŝeng-o*





Kunludo de bivoj

EL POPOLA ĈINIO

1980

N-ro 4

(259)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Ĉina aktoro Gao Fei kaj japana aktorino Kurihara Komaki, rolantoj en la televida filmo "Hejmosopira Stelo" kune farita de Ĉinio kaj Japanio

BILDPAĜOJ:

1 KOLORA SERIO

Ludo de naciaj muzikiloj

2 NIGRA-BLANKA SERIO

(1) Pajleja strigo; Rano kun kvar kornoj

(2) Envazaj miniatraj pejzaĝoj kaj majstro de tiu arto

(3) *Seng* en Pekina Opero

3 KOLORA SERIO

Yandang-monto

4 NIGRA-BLANKA SERIO

(1) Lin Daiyu (porcelanaĵo)

(2) Mateno de Guangzhou

5 KOLORA SERIO

(1) Fotografiaj verkoj de esperantistoj

(2) Freskoj en Antikva Nobela Tombo de Okcidenta Liang-regno

SUR LA DORSKOVRILO:

Petardo-floroj

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Enhavo

NIA KULTIVEJO: "Unu vido pli taŭgas ol dek aŭdoj" . . .	2
Amikeca floro sur fluoresko-ekrano	5
En Ĉinio	9
Neforgesebla vizito	10
Kantoj, dancoj kaj teatraĵoj de la ĉinaj nacimalplimulto . . .	12
KULTURAJ NOTOJ	16
Originala floro de arto	17
La Beijing-a Fabriko de Naciaj Muzikiloj	19
Jingdezhen — urbo de porcelanaĵoj	22
Vizito al kampara foiro	25
INTER NI: Pri fondo de entreprenoj per ĉina kaj alilanda kuna investo	27
VIDINDAJ LOKOJ: Yandang-montoj	29
Eminenta altosalta trejnisto Huang Jian	32
Verku por EPC	34
Saĝa edzino	35
Predo de Fiŝisto	36
Kiosko de Ebria Oldulo	37
Ĉu vi rigardis pekinan operon?	38
Favorajn kondiĉojn profitu! Abonu kaj abonigu!	40
Korespondi deziras	40
TRA ĈINIO: Antikva urbo Quanzhou	42
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Antikva tombo kun freskoj	46
AMIKECO: La monda boksa ĉampiono Muhammed Ali en Beijing	49
KALEJDOSKOPO	50, 56
KARIKATURO	51
KURANTAJ AFEROJ	52
ESP-NOVAĴOJ	4, 54



“Unu vido pli taŭgas ol dek aŭdoj”

—Mia unua vojaĝo tra Ĉinio

de NANCIE DURHAM

ENTUZIASMIGAS min la evoluanta nova Ĉinio! Bonŝance mi havas la okazon, esti tie por la trideka datreveno de ĝia fondiĝo, kaj mia vojaĝo havigis al mi pli bonan komprenon pri ĝia progreso.

Kun grupo da studentoj de la Literatura Instituto de la urbo Londono mi faris trisemajnan viziton en Ĉinio. La Societo pri Angla-Ĉina Interkompreniĝo kreis la programon kaj tre bone organizis ĉion. Dum la vizitado mi propraokule vidis ĝiajn konstruajn atingojn kaj pliboniĝantajn vivkondiĉojn; ankaŭ mi sentis ĉie etoson de kontento kaj optimismo, kiu estas multesignifa atestaĵo pri la sukceso de la juna popolrespubliko.

Kompreneble la venko de la ĉina popolo estas malfacile akirita, kaj ni konscias, ke multaj plibonigoj estas ankoraŭ bezonataj por ke Ĉinio povu atingi la nivelon de la moderna mondo. Tamen mi deziras esprimi mian ĝojon pro la progreso jam akirita. Ĉiuj aŭdis pri la brila civilizacio de Ĉinio, kies nesuperebla arto, filozofio kaj literaturo influis la tutan mondon. Ni aŭdis aliflanke pri aroj da duonnudaj kulioj kaj kamparanoj subpremitaj en apenaŭ imagebla mizero, pri malsatmorto kaj analfabeteco. Post aplikado de serio da novaj ekonomiaj kaj

sociaj rimedoj, ĉiuj povas manĝi ĝissate, kaj analfabeteco estas preskaŭ venkita. Mi estis forte impresita de la amaseco de homoj, kiuj aspektis sanaj, bonnutritaj kaj bonege vestitaj. Matene, apenaŭ krepuskiĝas kiam ŝajnas ke la tuta popolo praktikas subĉielan ekzercadon, eĉ kiam la vetero malfavoras. Sendube tia saniga kutimo kontribuas al la gracila aspekto kaj vicleplena movmaniero kiuj karakterizas ĉinajn infanojn kaj plenaĝulojn.

Beijing (Pekino) montras allogan miksaĵon de malnoveco kaj de laŭmodeco. Ni ekskursis per speciala tre komforta trajno ĝis Badaling, monto kiu situas kvardek kvin kilometrojn nordokcidente de la ĉefurbo. Ni mirrigardis la Grandan Muron, serpentumantan sur kruta montĉeno. Ni grimpis la gardturojn sur la parto kiu estas bone konservata. La Muro, unu el la sep fame konataj spektakloj de la mondo, estas elokventa simbolo de subpremo, kaj ni pensis pri la aroj da devigitaj laboristoj kiuj perdis sian vivon en ekspluatado kaj transportado de la materialoj.

Ĉe la montpiedo de Tianshoushan je 50 kilometroj for de Beijing en ĝia nordokcidenta antaŭurbo, ni promenis laŭlonge la aleon de bestoj kaj statuoj kondukantan al la Dek Tri Maŭzo-

leoj de Ming-dinastio (1368-1644), kaj ni eniris la vastan subteran palacon, tombon de la imperiestro Wan Li kaj liaj du edzinoj, kies kosto povus nutri milionon da kamparanoj dum ses jaroj. Ĝi estas atestaĵo pri la granda elspezo kaj ofero faritaj de la popolo por konstrui ĝin.

Kiam la Oklanda Alianca Armeo atakis Beijing en 1900, nia Lord Elgin malkonstruis la belegan Ĝardenon de Perfekteco kaj Ravo, ĝiajn palacojn kaj templojn, sed la promeniŝipo kondukis nin al la Palaco de la vidvina imperiestrino Ci Xi, kun la impona marmora boato. Ĉarmaj estis la trilado de birdoj, la senĉesa pepado de griloj kaj la gajeco de la ĉinaj vizitantoj en ilia libera tago. Imponaj estis ankaŭ la Templo de Ĉiela Paco, la grandega ĉomuro, la larĝa rekta Bulvarado de Ĉiama Paco (Chang'an-strato), kaj la vasta historioplana placo kun maŭzoleo de Prezidanto Mao Zedong, kiuj lasis al ni profundan impreson.

Per aviadilo ni atingis Hefei. Interalie ni vizitis grandan tekstilfabrikon, metiejon, mezlernejon kaj infanĝardenon. Tre plaĉis al mi la diverseco de belaj teksaĵoj, la manlerteco de laboristoj kiuj kreadis silkajn, lanajn, lakajn kaj bambuajn bildojn, lignajn aŭ jadajn skulptaĵojn



S-ino Nancie Durham interparolas kun Beijing-aj gesamideanoj.

kaj operokostumojn. Apenaŭ priskribebla estas la entuziasmo kiu ekregis, kiam ni ekaperis ĉe la infanĝardeno. La plej junaj infanoj regalis nin per kantoj kaj dancoj, kaj ni ŝatus resti longe inter tiel simpatiaj artistoj sed ne eblis, ĉar urĝis la tempo.

Nia tiama celo estis Nanjing (Nankino). Kiel imponas la granda ponto, per kiu la trafiko, kaj la ŝosea kaj la fervoja, estas tiom faciligita. Ĉe la maŭzoleo de Sun Zhongshan (Sun Jatsen) ni grimpis preskaŭ kvarcent ŝtupojn ĝis la supro, kaj ni ankaŭ grimpis la multajn etaĝojn de la impresa Pagodo, ĝuante la vastan panoramon de Nanjing (Nankino). Kasi-arboj parfumigis la aeron, lotuslagetoj briletis kaj bambuarbaroj etendiĝis ĝis la Purpura Monto super la urbo.

Ni pasigis tri interesplenajn tagojn en Shanghai (Ŝanhajo). Post vizito al la impona templo de la Jada Budho, ni revenis al la materiista mondo en la granda komerca ekspozicio. Shang-

hai rajtas fieri pri la diverseco kaj kvalito de la montritaj varoj.

En unu el la Geknabaj Domoj de Shanghai centoj da geknaboj praktikadis aŭ rigardadis tradician luktarton Tajĝiĉjuan, vivecajn konkursojn kaj diversajn aktivadojn. Aliaj geknaboj sin okupis pri ĉinstilaj pentraĵoj, olepentraĵoj, gravuraĵoj, argilaĵoj kaj modlaĵoj el farunpastro. Aŭskultante violonĉelojn, akordionojn, tradiciajn popolajn instrumentojn kaj kantojn en iu prezenta halo mi ne povis min deteni de esprimo de varmaj laŭdoj, ĉar la junaj muzikistoj montris mirindan talenton kaj ĝojplenan mienon.

Apenaŭ ni atingis Hangzhou (Hangĝoŭ) per trajno, ni tuj eksentis la sorĉon de ĝia beleco. Veturante sur la fama Okcidenta Lago ni bedaŭris la pluveton, sed la diverskoloraj akvolilioj, rokoj en groteskaj formoj, serenej plorsalikoj ambaŭborde kaj abundeco da floroj kaj tropikaj

arbustoj formis neforgeseblan paradizan pejzaĝon.

Ni vizitis la tian teproduktan brigadon. Ni observis la kolektheadon de zorge elektitaj foliopintoj kaj ĉiun laborprocedon ĝis la kontrolo de la preta teo. En la lasta somero la regiono suferis seriozan sekegecon kaj katastrofo ŝajnis neevitebla. Tamen, la tuta komunumo organizis senrezervan subtenon, fabrikoj ĉesigis laboron por konservi akvon por irigacio, do la rikolto estis savita kaj la brigado superplenumis la produktan taskon difinitan de la ŝtato.

Antaŭ la Liberiĝo la regiono estis en aĉa nezorgata stato kaj la popolo estis treege kompatinda. Post la Liberiĝo, la kamparanoj mem mobilizis iniciativon, ŝanĝis la fizionomion de la naturo per arbarplantado, herbosemado, transformado de montdeklivoj en ŝtuparkamponoj kaj eĉ forprenado de du montetoj sen helpo de maŝinoj. Maljunulo, bonveniganta min en sia simpla loĝejo, diris: "Tiu povas, kiu volas" kaj laŭdis la persiston al altigo de vivnivelo de la brigado.

Unu el niaj plej kortuŝaj travivaĵoj estis la vizito al la Kamparana Instituto kiu troviĝas en eksa konfucia templo en Guangzhou (Kantono). La plej altaj traboj ankoraŭ retenas brilegajn bildojn de Budhoj. En tia historia loko Mao Zedong komencis la edukadon de revolucianoj en 1926, kaj ankaŭ Zhou Enlai (Ĝoŭ Enlai) tie laboradis kaj instruadis. Respektege ni ekkonstatis ke niaj piedoj premis la saman polvon. Ni vidis la liton kaj kamforlignajn kofrojn de Mao, la dormejojn kie studentoj loĝadis tre malvaste kaj senlukse, kaj iliajn severuzitajn uniformojn kaj sandalojn.

Ni spektis prezentadojn de nacistilaj operoj, muziko kaj akrobataj karakterizitaj per loka gusto, vigla ritmo kaj okulfrapanta brilo. Ni vizitis multajn klinikojn kaj malsanulejojn, fotis multegon da sovaĝaj vegetaĵoj kaj bestoj uzitaj en la kliniko kaj rigardis traktadon per akupunkturo kaj aliaj terapioj. Ni ankaŭ aprecis la kuirarton de Ĉinio kaj ĝiajn multajn bongustajn manĝaĵojn. La fama rostita pekina anaso plaĉe bonodoras kaj estas por ni neforgesebla ĝuo.

Tamen, antaŭ ĉio ni tenas en la memoro la ridetojn de la ordinara popolo. Aparte impresis nin la afableco de familioj kiuj bonvenigis nin en malgrandaj puraj komfortaj domoj, regalan- te nin per teo kaj respondante niajn diversajn demandojn.

Dum la tuta vojaĝo niaj prizorgantoj treege afable helpis nin kaj tradukis kun laŭdinda kompetento. Tamen paroli pere de interpretisto ĝenas min. Do, kiel ĝoja mi estis kontakti ĉinajn esperantistojn kaj eviti la plej grandan obstaklon al amikeco inter popoloj de la mondo — la lingvan diversecon. Mi renkontis reprezentantojn de Radio Pekino kiuj sciigis al mi la horojn de iliaj Esperantaj disaŭdigoj kaj diskutis la perspektivon kaj rolon de la internacia lingvo en Ĉinio kaj la mondo.

Mi ankaŭ renkontis reprezentantojn de la redakcio de la revuo "El Popola Ĉinio". Tiu gazeto altiras ĉiuaĝajn legantojn kaj prezentas al ili interesplajn raportojn pri la popola vivo, amuzo kaj amo, pri disvolviĝo de regionoj de nacimultiplimultoj, pri Esperantaj aktivadoj, kaj pri ĉinaj belaĵoj. La bildoj kaj ilustraĵoj estas nesu-

pereblaj. Mi tre ĝojis konatiĝi kun tiel aktivaj esperantistoj.

Ankaŭ ĉeestis amiko kiu reprezentis la Ĉinan Esperanto-Ligon al la Universala Kongreso en Lucerno ĉijare. Antaŭ kvardek jaroj Prezidanto Mao aprobis Esperanton, kaj la lingvo progresas en Ĉinio, dank' al tiaj geamikoj. La geesperantistoj bonvenigis min tre varme, kaj ni interparolis facile dum tri horoj, kvankam mi estas komencanto en Esperanto. Mi kaptis la okazon por esprimi la bondezirojn de la Londona Esperanta Klubo al niaj ĉinaj geamikoj.

Mi malŝparis multe da tempo por lerni fremdajn lingvojn, sed nun mi konstatas, ke la unua racia, facile lernebla lingva ponto inter diversaj popoloj estas Esperanto. Ni devas celi, ke ĝi estu vaste instruata, por ke ni evitu la malŝpareman elspezon de tempo kaj mono en transnacia komunikado, kaj ni kune kontribuu al reciproka kompreno kaj amikeco.

Por mi, la renkonto kun samideanoj lasis neforgeseblajn memoraĵojn kaj valoras la vojaĝon. Ili montris tiel varmegan amikecon al mi. Mi estas kontenta de la tuta vojaĝo, sed mi scias ke la lando ne havigas tiel favoran impreson al ĉiu turistoj. Do, vi nepre devas iri tien kaj propraokule vidi!

Ni foriris el Guangzhou, post facile plenumitaj lim-formalaĵoj, per fervojo kaj veturis rekte al Jiulong, tra la fama ponto. Lumpostenoj sur la montsuproj indikis ke tie finiĝis nia mallonga restado en Ĉinio. Ni tenas en la memoro antikvajn vizitindejojn, artajn trezorejojn kaj muzeojn, vastajn bone prizorgatajn ebenaĵojn kaj rizkampojn.

(Skribita en 1979)



ALTA PROTEKTANTO, TEMO KAJ ALIĜINTOJ DE 65-A UK


S-ro Ingemund Bengtsson, prezidanto de la sveda parlamento, fariĝis alta protektanto de la 65-a UK. Inter tiuj, kiuj jam akceptis lokon en la Honora Komitato estas Olof Palme, eksĉefministro de Svedujo, Björn Collinder, eminenta lingvisto kaj tradukisto k. a. La kongresa temo estas "Diskriminacio" rasa, kontraŭvirina, ekonomia, etna kaj, kompreneble, ankaŭ lingva. Dum la kongresado elektiĝos nova Komitato de Universala Esperanto-Asocio. Ĝis la 19-a de dec. 1979, estis registritaj 464 kongresanoj el 40 landoj, plej multnombre el la kongreslando Svedujo mem, Nederlando, Francujo kaj FR Germanujo.

"LA NEALIANCITECO — KONSCIENCO DE LA HOMARO" DE JOSIP BROZ TITO

Lastatempe ni ĝoje ricevis la libron "La Nealianciteco — Konscienco de la Homaro" en kiu estas metitaj paroladoj de Prezidanto Tito en konferencoj de la nealiancitaj landoj, okazintaj en Beograd 1961, Kairo 1964, Lusako 1970, Alĝero 1973, Kolombo 1976 kaj Beograd 1978. Krome oni aldonis al ĝi mallongan statistikaĵon pri la unuaj kvin konferencoj de la nealiancitaj landoj. Ĝi estas eldonita de Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, Jugoslavio. Redaktoro de la Esperanta eldono: Mustafa Resulović, esperantigis: Senad Čolić, kaj lingva kontrolanto: Prof. Momčilo Šaponjić. Formato: 14 × 20 cm, broŝurita, 100 paĝoj, prezo: 30 Din., kun rabatoj: 5—20 ekz. — 20%, pli ol 20 ekz. — 30%, plus 10% por sendokostoj. Mendu ĉe "ELBIH", V. Pelagića 8/I, 71000 Sarajevo, Jugoslavio.

ZHONG LUN:

Amikeca floro sur fluoresko- ekrano



Hasegaŭa Teru kaj ŝiaj edzo kaj infano promenadas sur la bordo de Changjiang-rivero.

—Pri filmado de eksterdomaj scenoj por la televida filmo
“Hejmosopira Stelo”

PERFEKTE plenumiĝis filmado de la eksterdomaj scenoj en Ĉinio por la televida filmo “Hejmosopira Stelo” prikantanta la faman japanan esperantistino Hasegaŭa Teru (Verda Majo), kiu kontribuis por la amikeco inter Ĉinio kaj Japanio. La filmo vere registris la vivon kaj la laboron de Hasegaŭa Teru en Ĉinio. Ĝi certe estos varme akceptata de spektatoroj, precipe de esperantistoj.

I

En 1937, japana studentino Hasegaŭa Teru, kiu aktivadis por progrese Esperanta movado, venis al Ĉinio. Ŝia ĉina novedzo Liu Ren, kiu studis en Japanio, revenis al ŝia patrolando pli frue. La juna paro ĝoje kuniĝis en Shanghai (Ŝanhajo). Estis malfeliĉe, ke la agreso de la japanaj militaristoj rapide eten-

diĝis de norda Ĉinio al Shanghai kaj rompis ilian deziron pri kvietaj vivo. Liu Ren partoprenis en la sankta batalo de la sampatrujanoj kaj ankaŭ Teru senhezite staris ĉe la flanko de la ĉina popolo. Ili brave sin jetis en la Kontraŭjapanan Rezistmiliton kaj laboris poste en Wuhan (Vuhan), Chongqing (Ĉongking) kaj aliaj lokoj. Teru funkciis kiel parolistino por propagandi al la japanaj armeanoj. Post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito, la geedzoj veturis al la liberigita regiono de nordorienta Ĉinio por sin dediĉi al la liberiga afero de la ĉina popolo. En 1947, Teru kaj ŝia edzo mortis unu post la alia pro malsano kaj postlasis la gefilojn Liu Xing kaj Liu Xiaolan. La lastaj ricevis apartan zorgadon de la ŝtato kiel idoj de la martiroj. En aŭgusto de 1978,

la pliaĝa fratino de Teru vizitis Ĉinion kaj intervidiĝis kun ŝiaj genevoj.

Por bone reaparigi la mallongan kaj gloran vivon de Hasegaŭa Teru, dramisto Iŭama Joŝiki kaj reĝisoro Morikai Teiĝi vizitis Ĉinion, esploris tiujn lokojn, kie Teru kaj ŝia edzo laboris kaj vivis, kaj interparolis kun multaj amikoj kaj kolegoj de la geedzoj. La lastaj liveris al ili multon da vivecaj materialoj pri la geedzoj. La bravaĵo de Teru profunde kurtuis la dramiston. Reveninte al Japanio, li finis poluradon al la dramo post pluraj maldormaj noktoj. Ankaŭ la reĝisoro projektis kaj aranĝis neordinarajn scenojn laŭ la nove akiritaj materialoj. En decembro de 1979, la filmista grupo de “Hejmosopira Stelo” de la Kontrakta Kompanio de Televidaj Progra-



Filmistoj en laboro

meroj de Japanio venis al Ĉinio por filmi eksterdomajn scenojn.

En la filmo la protagonistino Hasegawa Teru estas ludita de la fama japana filmaktorino Kurihara Komaki kaj la protagonisto Liu Ren ludita de aktoro de la Ĉina Brodkasta Ensemblo Gao Fei. Kurihara Komaki estas ĉarma kaj saĝa stelulino fame konata de la ĉinaj spektatoroj, kaj Gao Fei bela kaj altstatura. Oni diris, ke la du aktoroj estas tre taŭgaj por la roloj. La filmado estas la unuafoja agrabla kunlaboro de la ĉinaj kaj japanaj televidaj laborantoj.

II

Shanghai estis la unua stacio, kie la protagonistino surpaŝis la landon de sia edzo, kaj ankaŭ loko, kie Liu Ren atendis sian edzinon el Japanio. Tuj ĉe la

ordono de la reĝisoro pri ekfilmado, altstatura belulo hastege trapasas inter dokistoj kaj ŝipanoj kaj subite li ekkrias: "Teru! Teru!" Li sin pafas al virino ĵus elŝipiĝinta. La lasta plirapidigas siajn paŝojn, aŭdinte la krion. Ili estas Teru kaj Liu Ren. Vidinte sian karan edzon, Teru sin ĵetas en lian sinon, kaj ili varme ĉirkaŭprenas unu la alian... Teru malrapide levas la kapon kaj ameme rigardas sian edzon. Larmoj fluas de sur ŝia vizaĝo kaj Liu Ren milde forviŝas ilin per mano. Ili turnas siajn okulojn al Huangpu-rivero kaj al la konstruaĵoj kun aparta stilo sur la bordo. Liu Ren diras: "Ĝi estas mia kaj ankaŭ via Ĉinio." Teru kompreneme kapjesas kaj en ŝiaj okuloj brilas profunda amo kaj espero.

La aktoroj tre perfekte ludis sian rolon kaj la filmisto per

alta tekniko kinematografis ĉiujn tiujn kortuŝajn kaj vivecajn scenojn.

Nelonge post kiam Teru venis al Ĉinio, la japana imperiismo lanĉis militon kontraŭ Ĉinio, kaj la kontraŭjapana naciŝava movado balais la tutan Ĉinion. Shanghai sin banas en sunbriloj en frua vintro. Ambaŭflanke de strato en Xuhui-kvartalo aperis sloganoj pri batalo kontraŭ Japanio kaj savo de la nacio. Alte tenante horizontalan rubandon kun la slogano "Falignu la japanan imperiismon", la indignantaj shanghai-anoj manifestacias surstrate. Ili laŭte krias sloganojn. Teru en ĉina kostumo legas flugfolion donitan de iu manifestacianto kaj aperas sur ŝia vizaĝo mieno de hezito kaj doloro. Ĝuste tiam Liu Ren alvenas, kun laŭtparolilo en mano, kune kun la manifestaciantoj. Teru kuratingas lin kaj demandas tirante lian manon: "Ĉu vi antaŭlonge informiĝis pri okazigo de la manifestacio?... Kial vi tion kaŝas antaŭ mi?" "Mi ne volas, ke vi implikiĝu en la vortoj de 'batalo kontraŭ Japanio'," respondas Liu Ren. Teru emocie diras: "Mi volas rigardi min kiel ĉinon, sed vi ĉiam traktas min kiel japanon..." Ŝiaj vortoj multe kortuŝas Liu Ren, kaj ili ambaŭ enviciĝas inter manifestaciantoj mano en mano.

En tiu sceno Kurihara Komaki profunde prezentis ŝanĝojn de Teru: animskuiĝo, doloro, ekscitiĝo kaj poste senhezita sinjeto en la batalon de la ĉina popolo kontraŭ la agresiva milito. Apenaŭ finiĝis filmado, alpaŝis maljunaj preterpasantoj, ili kun larmoj en la okuloj diris: "La



Liu Ren faras paroladon kontraŭ interna milito.



Hasegawa Teru kaj ŝia edzo luktas kun kuomintangaj sekretaj policianoj.

kostumoj de la aktoroj kaj la sloganoj tute konformas al tiuj en la tiama Shanghai. Ili tiel bone ludis siajn rolojn, ke ni sentis nin rigardantaj kvazaŭ ne prezentadon, sed nian pasintajn.”

Je la 22-a de decembro, la filmista grupo kaj japanaj kaj ĉina aktoroj flugis de Shanghai al la monta urbo Chongqing en sudokcidenta Ĉinio.

III

Laijiaqiao en la antaŭurbo de Chongqing estis unu el la sidejoj de la Kultura Labor-komitato gvidata de la granda ĉina intelektulo Guo Moruo (Guo Mojuo) kaj ankaŭ loko, kie Liu Ren kaj Teru vivis kaj laboris. Tie la ĉirkaŭaj ondantaj montoj kaj proksimaj ŝtuparaj kampoj, sur kiuj dissemiĝas vilaĝetoj, formas belan pejzaĝon.

Liu Ren kaj Teru venis al Chongqing post kelktempa laborado en Shanghai, Guangzhou

Hasegawa Teru ĉirkaŭprenas sian vunditan edzon kaj kuraĝigas lin persisti en batalo.



(Kantono) kaj Wuhan, kaj tie naskiĝis ilia filo Liu Xing — kristaliĝo de ilia amo. La reĝisoro projektis kortuŝan scenon de la naskiĝo de Liu Xing kun celo modli la artajn figurojn de Liu Ren kaj Teru per bagateloj de la vivo. En jaroj de batalo kontraŭ la japanaj agresantoj Teru ne restigas sian edzon ĉe si por sia akuŝo, kaj ankaŭ Liu Ren ne prokrastas sian laboron tiurilate. Tamen ilia amo estas tre arda. Teru akuŝas en foresto de Liu Ren, sed vilaĝanoj kaj membroj de la kultura laborgrupo prizorgas ŝin kiel sian karulon. Post naskiĝo de Liu Xing la vivo de Teru kaj Liu Ren fariĝis pli interesa kaj streĉa. Teru ofte skribas artikolojn sub la lampolumo post endormiĝo de la infano. En libera tempo la geedzoj, kunportante sian filon, ofte kamplaboras aŭ promenas ĉe la bordo de la pitoreska Changjiang-(Jangzi)-rivero. Tamen la vojo estas zigzaga kaj la batalo komplika. La ĉina popolo venkis en sia Kontraŭjapana Rezistmilito. Sed Jiang Jieshi (Ĉiang Kajŝek) lanĉis kontraŭkomunisman kaj kontraŭpopolan militon, kaj Liu Ren kaj Teru denove sin ĵetis en la novan batalon.

En mitingo kontraŭ la interna milito Liu Ren justoplene laŭte parolas: “Ĉu la hodiaŭa paco ne estas akirita je kosto de multa sangverŝo? Kial ĉinoj batalu unuj kontraŭ aliaj?... Ni devas postuli establon de demokratia koalicia registaro.” “Jes, establu demokratian koalician registaron!” laŭte krias la amasoj. Subite kuomintangaj banditoj entrudiĝas en la kunvenejon kaj faligas Liu Ren

teren. Tiam Teru elkuras el la homamaso kaj maltrankvile vokas: “Liu Ren, Liu Ren!” Ŝi starigas la svenintan edzon kaj forviŝas la sangon de sur lia vizaĝo. Kiam Liu Ren reakiris konscion, ŝi indigne diras: “Daŭrigu la movadon ĝis la fino kune kun la kamaradoj. Ni iru al Shanghai!” La longe provita Teru montras sin nefleksebla. Ŝi firme kredas, ke la afero de ŝi kaj ŝia edzo estas justa kaj certe venkos.

IV

La geedzoj revenas al Shanghai, kiu estas sub la regado de Kuomintango. Pro mizera vivo Teru devas vendi legomojn en bazaro sen scio de sia edzo. Sub la helpo de la komerca departemento estis aranĝita bazaro de la kvardekaj jaroj, en kiu troviĝas multaj grandaj kaj malgrandaj vendobudoj kaj vendotabloj kaj aŭdiĝas krioj de vendistoj. Je la ordono de la reĝisoro pri ekfilmado, Teru en ĉina virina kostumo malpeze iras antaŭ du korbojn da brasiko kaj sidiĝas sur benketon. Ŝi krias en la ĉina lingvo: “Bongusta kaj freŝa brasiko! Ĝi nur kostas po 4 centojn por kilogramo, bonvolu aĉeti ĝin!”

Venas en la bazaron ŝia edzo. Vidinte Teru vendanta brasikon, li sentas sin kordolora. Sed Teru rekomendas al li per humura tono: “Sinjoro, brasiko estas freŝa kaj bongusta!” kaj donis al li unu brasikon. Liu Ren kaŭriĝas antaŭ Teru, ŝin rigardas stupore. Subite li forĵetas la brasikon kaj foriras ne dirante unu vorton. Teru lin akompanas per rigardo de nekomprene kaj doloro. Post momento Liu Ren revenas. Tirante

brakon de sia edzino, li diras: “Teru, ni iru al la kamparo de Liaoyang. Miaj gepatroj kaj frattoj certe nin bonvenigos...” Ĉe tio la reĝisoro ordonis: “Haltu!” Li montris plenan kontenton pri la ludo de la geaktoroj. La subtila ludo de Kurihara Komaki ricevis varmajn laŭdojn de la ĉeestantoj.

Ŝi diris, ke ŝi neniam havis ŝancon kunlabori kun ĉinaj kolegoj en prezentado, en kiu ŝi parolu ĉine kaj la ĉina aktoro japane. Ŝi diris ankaŭ, ke la televida filmo priskribas mal-feliĉan historion de la milito inter Ĉinio kaj Japanio. Oni devas memori la gejunulojn pri tiu historia leciono, ke la japana kaj ĉina popoloj amikiĝu de generacio al generacio!

V

Jam finiĝis la filmado de la eksterdomaj scenoj en Ĉinio por “Hejmosopira Stelo”. Kurihara Komaki kaj granda parto de la personaro de la filmista grupo jam forlasis Ĉinion. Baldaŭ la geaktoroj de ambaŭ landoj renkontiĝos en Tokio kaj plenumos la lastan filmadon de la filmo.

La filmo mem povas esti rigardata kiel himno pri la amikeco inter Ĉinio kaj Japanio. Kaj ankaŭ en la filmado de la eksterdomaj scenoj en Ĉinio koaguliĝis la amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj. Sinjoro Morikai Teiĝi bone komprenas la signifon de sia laboro. Li ĝoje diris al ĉinaj amikoj: “Tiu televida filmo prezentiĝos al la rigardantoj en la tempo, kiam disfloros la sakuroj, kaj dum vizito de prezidanto Hua Guofeng al Japanio en la kuranta jaro.”

En Ĉinio

*Kurihara Komaki
en Chongqing*

EN septembro de 1979 mi unuafoje vizitis Ĉinion por partopreni en la semajno de japanaj filmoj aranĝita de tiu lando. Mi ne atendis, ke post tre mallonga tempo mi havas ŝancon reviziti ĝin, kaj mi tre ĝojis pri tio. Mia ĉi-foja alveno celis filmi la televidan filmon "Hejmsopira Stelo", en kiu japanaj kaj ĉinaj geaktoroj kune ludas la unuan fojon.

La "Hejmsopira Stelo" priskribas, kiel geesperantistoj Liu Ren kaj Hasegaŭa Teru (Verda Majo)

formis inter si sinceran amon kaj kun alta idealo batalis kontraŭ subpremo kaj kontribuis por paco dum la jaroj 1937-1947 kiam Ĉinio kaj Japanio ambaŭ troviĝis en mallumo kaj malfeliĉo.

Ni vojaĝis laŭ iliaj piedsignoj al Shanghai (Ŝanhajo) kaj Chongqing (Ĉongking) por filmi. Kvankam tio mallonge daŭris, tamen restis al mi nemalmultaj rememoroj.

La vivoplenaj stratoj de Shanghai, la larĝa Changjiang (Jangzi)-rivero, la pi-




toreskaj vilaĝoj de Chongqing, ĉiuj tiaj scenoj ŝvebas en mia cerbo. Estas neniam forgeseblaj por mi la distingindaj ĉinoj, kiujn mi renkontis: la profunda amikeco prezentita de amikoj de la Centra Brodkasta Administra Buroo, la plena entuziasmo kaj diligenteo montritaj de la aktoroj kaj laborantoj, kaj la helpemo de tiel multaj homoj, kiuj ĉiamaniere faciligis nian filmadon. Mi multe spertis la ĝojon, ke la popoloj de ambaŭ landoj kune klopodas por krei verkon. Mi pensas, ke la televida filmo priskribanta la du pionirojn por ĉina kaj japana amikeco ligiĝos kun la nuna amikeco inter la du landoj.

Mi kredas, ke eterne amikos la japana kaj ĉina popoloj!

Mi esperas, ke la mondaj popoloj unuiĝos por defendi pacon!

Manuskripto de Kurihara Komaki



Neforgesebla vizito

ANTAŬ nelonge ni venis al Chongqing (Ĉongking), la plej granda urbo en sudokcidenta Ĉinio, por fari viziton. Ni travivis tie 15 neforgeseblajn tagojn, en kiuj ni intime intervidiĝis kun multaj junaj kaj maljunaj esperantistoj.

Ili diris, ke frue en la jaro 1920 Esperanto estis enkondukitaj en tiun urbon. En la tridekaj jaroj ĝia Esperanta movado estis relative vigla, kaj multaj esperantistoj aktive propagandis Esperanton por disvolvi la kontraŭjapanan nacisavan movadon. Ĉe la komenco de la kvardekaj jaroj, iuj famaj ĉinaj esperantistoj venis tien por fari kontraŭjapanan propagandon kaj Esperantan laboron. Ili eldonis la Esperantan gazeton "Heroldo de Ĉinio" kaj per propagando kaj korespondo konigis al alilandaj esperantistoj la perfortaĵojn de la japanaj agresantoj kaj la heroaĵojn de la ĉina popolo en ĝia rezistado. Estas aparte menciinde, ke la fama japana esperantistino Verda Majo batalis ŝultro ĉe ŝultro kun la Chongqing-a popolo. Anekdotoj pri ŝi estas rakontataj ankoraŭ nun.

De la vintro de 1938 ĝis la fino de 1945 ŝi laboris en Chongqing. Ŝi plurfoje transloĝiĝis pro la persekutado de kuomintangaj spionoj. La 75-jara

veterana esperantisto Ran Qinfang, estro de la prepara grupo de la Chongqing-a Esperanto-Ligo, tiam multfoje gastis en ŝia hejmo.

Frue en 1929 Ran Qinfang jam konatiĝis kun Liu Ren (Liu Ĵen), la edzo de Verda Majo. Tiam ili ambaŭ estis studentoj de la Nordoriento. Kaj ĉirkaŭ 1942 ili denove renkontiĝis en Chongqing. Liu Ren invitis Ran Qinfang al sia hejmo, kaj tiel la lasta konatiĝis kun Verda Majo. Ŝi arde amis literaturon kaj ofte diskutis pri verkoj de iuj literaturistoj kune kun sia edzo kaj Ran Qinfang. Ŝi plej admiris Lusin, Guo Moruo (Guo Moĵuo) kaj Mao Dun (Maŭ Dun) el la ĉinaj verkistoj. Ŝi

tre ŝatis "Diinon", "Feniksan Nirvanon" kaj aliajn verkojn de Guo Moruo.

Verda Majo oponis la agreson de la japanaj militaristoj kontraŭ Ĉinio jam de ĝia komenco. Foje ŝi tiel respondis la demandojn de kelkaj junulinoj: "La agresan militon ni, la japana popolo, firme oponas. Tiu ĉi milito estas malutila ankaŭ por la japana popolo kaj plago por ĝi." "Kiel japanino, sendube, mi tre amas nian japanan nacion kaj ankaŭ aliajn naciojn, precipe vian ĉinan nacion. Mi ekstreme malamas la kruelan subpremadon de la japanaj militaristoj al alia nacio."

Dum tiu tempo Verda Majo okupiĝis pri la japanlingva dis-

E-kurso en la Tria Normala Instituto de Chongqing




aŭdigado de la ĉina radiostacio al Japanio. Aŭdinte ŝian voĉon, la japanaj regantoj tre koleris, kalumniante ŝin kiel naciperfidulon. Ili bruis, ke ili kaŝmortigos ŝin, sed ŝi tion tute ignoris. Ŝi diris: "Oni devas sensanceleliĝe fari tion, kio estas farenda. Sin gardi estas necese, tamen oni absolute ne devas ĉesigi sian justan agon pro danĝero." Ŝi respondis ilian minacon per sia pli energia laboro. De mateno ĝis vespero ŝi atente legis librojn kaj ĵurnalojn kaj entreprenis tradukadon kaj verkadon. Ŝi ofte skribis Esperantajn informojn. Ŝi faris ĉiujn siajn penojn por la kontraŭjapana batalo de la ĉina popolo kaj oferis sian tutan junecon tiurilate.

Ni trovis dum nia vizito, ke iuj esperantistoj ankoraŭ konservas la verkojn de Verda Majo "En Ĉinio Batalanta", "Flustr' el Uragano" ktp. Iu esperantisto emocie diris: "La ĉinaj esperantistoj ĉiam memoras ŝian nomon."

La Tria Normala Instituto de Chongqing havas pli ol 500 studentojn, inter kiuj pli ol 300 studas fremdajn lingvojn. Inicijate de Li Ren, vicdirektoro de la nomita instituto kaj vicestro de la prepara grupo de la Chongqing-a Esperanto-Ligo, oni funkciigis ekde oktobro de 1979 Esperantan kurson, kiun vizitas 22 elstaraj studentoj elektitaj el tiuj de la dua klaso de la angla lingvo.

La lernotempo de la kurso estas unu jaro, kaj la kursanoj havas du lecionojn ĉiusemajne, kun "Libro por Kursoj" de E. Privat kiel lernolibro. Kiam ni atingis la kurson, Li Ren estis instruanta al la kursanoj Esperantan kanton: "Fratoj al Sun', libereco, fratoj nun supren al

Esperantistoj antaŭ la iama loĝejo de Verda Majo (Ran Qinfang meze en la fronta vico)



lum' . . ." Li diris al ni, ke instruisto Xu Shouzhen (Eltunko) lernigis al li tiun kanton antaŭ pli ol 30 jaroj kiam li lernis Esperanton. Li Ren mem funkcias kiel instruisto de Esperanto. Li bone scias kombini instruadon de la angla lingvo kaj Esperanto kaj analizi la samecon kaj malsamecon inter la du lingvoj, aŭ per la angla lingvo klarigi iujn malfacilajn demandojn por solidigi la sciojn de la kursanoj.

Ni demandis kelkajn kursanojn, ĉu lernado de Esperanto malhelpas ilin lerni la anglan lingvon. Ili respondis, ke ĝi ne malhelpas, sed helpas ilin profunde kompreni la anglan lingvon. Kaj samtempe lernado de la angla lingvo multe akcelas ilian posedon de Esperanto. Iu kursanino diris: "La trimonata lernado komprenigis min, ke Esperanto estas vere lerninda scienca lingvo. Kiel estonta popola instruistino, mi nepre

penos por ellerni ĝin kaj kontribuos por ĝia disvastigo."

Dum vizito ni ankaŭ havis ŝancon interparoli kun membroj de du Esp-aj kursoj fonditaj de la Laborista Sindikato de la Centra Distrikto. En la interparolo ni rimarkis eksterordinaran inklinon de tiuj junuloj al Esperanto. Iuj el ili dediĉas ĉiujn siajn postlaborajn horojn al lernado de Esperanto, kaj aliaj persiste vizitas la kurson malgraŭ pluvo kaj vento aŭ okupateco en dommastrumado. Inter la kursanoj troviĝas komizoj, kelneroj, laboristoj kaj bankistoj.

Dum la lastaj du jaroj pli kaj pli da alilandaj turistoj vizitis Chongqing. Al gastoj kaj akceptantoj mankas lingvo komprenebla por ambaŭ flankoj, kio multe ilin ĝenas. Laŭ la postulo de oficistoj kaj laboristoj, la Laborista Sindikato de la Centra Distrikto funkciigis la postlaborajn kursojn de Esperanto



E-kursanoj de la Laborista Sindikato de la Centra Distrikto de Chongqing kun malnovaj esp-istoj de la urbo en parko

kaj la japana, angla kaj franca kaj ĉiufoja lernado daŭras du lingvoj. Oni vizitas la Esperantan kurson trifoje ĉiusemajne, estas “Fundamenta Lernolibro

de Esperanto” kompilita de Fang Shanjing (Tikos).

En la kunsido la kursanoj ĉiuj faris parolon. El iliaj paroloj videbliĝis, ke la prosperiĝo de la ĉina Esperanta movado en la lastaj jaroj kompakte ligiĝas kun la konstruado de la kvar modernigoj. Iu kursanino diris: “Por lerni la eksterlandan avangardan sperton kaj modernigi nian landon, ni devas ellerni fremdajn lingvojn. Esperanto estas ponto por plivastigi la internacian komunikigon kaj plifirmigi amikecon, tial ni nepre devas ĝin posedi.” Alia kursano diris: “Esperanto estas lingvo perspektiva. Kun la disvolviĝo de la socio kaj plimultiĝo de la internacia komunikigo, oni pli kaj pli klare vidas ĝian valoron por la homaro.”

Kantoj, dancoj kaj teatraĵoj de la ĉinaj nacimalplimulto

de LI YAOZONG

EN la lastaj monatoj prezentigis novaj artaj programoj sur la Beijing-a scenejo. Inter ili troviĝis tibeta baletto “Al Batalo”, kiu interesis la rigardantojn. Ĝi priskribas la tribestron Gesar, kiu gvidis siajn armeon kaj popolon al batalo kontraŭ invadantoj por defendi siajn teritorion kaj pacan vivon.

Ĝi estas adaptaĵo laŭ fragmento de la tibeta epopeo “Gesar”, unu el la plej longaj epopeoj de la mondo. La kolektitaj partoj de la epopeo ampleksas jam pli ol unu milionon da versoj. Ĝi estas tradukita en 10 fremdajn lingvojn por ĝin konigi al la mondo. De unu flanko ĝi spegulas la longan historion

de kulturo kaj arto de la ĉinaj nacimalplimulto kaj ilian riĉan enhavon.

KANTOJ KAJ DANCOJ KUN RIĈA ENHAVO KAJ VARIAJ FORMOJ

En la brila kultura kaj arta trezorejo de la ĉinaj nacimalplimulto iliaj elegantaj kantoj kaj

dancoj okupas okulfrapan lokon. La pli ol 50 nacimalplimulto de Ĉinio estas lertaj en kantado kaj dancado. Ili kantas apartajn kantojn konvenajn por kantado dum laboro per bovo, muelado, aktivado sur monto kaj paŝtado. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio la popola registaro faris grandskalan esploradon kaj elfosadon de grandega nombro da kantoj kaj dancoj de la ĉinaj nacimalplimulto kaj ilin savis de pereado.

La epopeo "Meige" estas savita dank' al maljuna kantisto, kiu ĝin kantadis dum 8 tagoj kaj 8 noktoj por ke oni ĝin registru. La ujugura muziko "Dek Du Mukam-oj" havas pli ol 170 melodiojn kaj 72 muzikpecojn kaj bezonas pli ol 20 horojn por unufoja ludo. Nur du aŭ tri maljunaj artistoj scipovas kanti ĉiujn pecojn de tiu klasika verko, la ordigado de ĝi daŭris kvar jarojn kaj nun ĝi estas jam eldonita. Krome, la tibeta, naŝi-a, dung-a kaj ĝuāng-a naciecoj ĉiuj havas siajn klasikajn kantojn kaj dancojn, kiuj estis elfositaj kaj eldonitaj en libroj post kompilado.

La popolkanto *hūa-er* vaste cirkulanta en nordokcidenta Ĉinio estas ŝatata de la huj-aj kaj tu-aj popolanoj. Ekzistas pli ol 100 specoj kaj ĉ. 1,000 melodioj de *hūa-er*. Kiam okazas festivalo de *hūa-er*, popolanoj venas al la kantejo pelante ŝafgregon, portante sakon da bakita faruno surdorse kaj vinbotelon en mano. Tie ili improvizas versajojn kaj ilin kantas tiel sonore, ke ilin laŭte eĥas la montoj. Sur la stepo de la Interna Mongolio cirkulas speco de amasa kantodanco *andai*. Kutime, iu kantas en gvido kaj la aliaj lin sekvas, dancante kun silka tuko en mano. Nun ĝi jam fa-

riĝis sceneja prezentaĵo dank' al prilaboro.

Diversspecaj kantodancoj devenas el la riĉa vivo. La antaŭaj kantodancoj de la nacimalplimulto plimulte estis nur lirikaj dancoj unu-, du- aŭ plurpersonaj. Nun kreiĝis granda nombro da epopeaj dancoj kaj baletoj kun riĉaj enhavoj, komplikaj intrigoj kaj multaj personoj. Ankaŭ altiĝis la prezentaĵo. La kantodanco de Xinjiang (Hingiang) "Vivu la Popola Komunumo" estas prezentata de pli ol 200 aktoroj. Ĝi ensorbas la esencojn de la tradiciaj kantodancoj de diversaj naciecoj de Xinjiang. Ĝi prikantas la vojon iritan de la Xinjiang-a popolo, kiu liberiĝis el la malnova socio kaj fariĝis mastro de la nova socio. Krome, iuj mallongaj folkloraj kantodancoj prikantas, de malsamaj flankoj, la laboron, amon kaj belan novan vivon.

Koncerne al la nacia voĉa muziko, antaŭe ĝi plejparte pre-

nis por si la formon de solkanto kaj ĥoro, kaj nun jam adaptiĝis al la formoj de miksitaj kanto por viraj kaj inaj voĉoj, dueto kaj kanto kun gestado. La muzikiloj de la nacimalplimulto ĝenerale estis uzataj por solo aŭ kunludo, sed nun ili ofte estas kunaranĝitaj en orkestra prezentaĵo. Ankaŭ lokaj antikvaj popolaj instrumentoj kiel bovĝamba violono, kalabasa ŝeng-o post reformo, povas esti ludataj sur scenejo.

NACIAJ TEATRAĴOJ EN DISVOLVIĜO


En pli ol 200 specoj de teatraĵoj de la tuta Ĉinio, la tradiciaj teatraĵoj de la nacimalplimulto okupas gravan lokon. La naciecoj tibeta, baj-a, ĝuāng-a, dung-a, taj-a kaj aliaj havas sume pli ol 10 specojn de ili. Krom la ujugura opero kun historio de 50 jaroj, ĉiuj aliaj specoj havas historion de pli ol 100 jaroj. Iuj specoj havas perfektan prezentan proceson kaj

Popolanoj de ĝino-nacieco prezentas la dancon "Ĝojiga Riĉa Rikolto sur Ĝino-monto"





Ujgura kantistino Dilibar en prezentado



Artistinoj de Ulanmuĉi de la Interna Mongolio prezentas dancon por paŝtistoj.

detalajn diferencigojn de malsamaj roloj.

Dum la tridek jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la popola registaro energie flegadis la teatran aferon de la nacimalplimulto. En Yunnan (Junnan)-provinco, por helpi la baj-an naciecon establi sian ensemblon, la popola registaro sendis laborantojn por viziti maljunajn artistojn kaj tiel revivigis pli ol 300 tradiciajn teatraĵojn. Ankaŭ la taj-a, tibeta kaj ĝuang-a naciecoj elfosis centojn da propraj teatraĵoj. Post prilaborado kaj polurado ilia arto atingis novan nivelon. Ekz., la tibeta opero estis limigita en formo kaj stereotipa en kantado, prezentado kaj akompanado, sed nun ĝi jam estis reformita kaj prezentata en teatro anstataŭ sur

strato. Dum reformado al siaj teatraĵoj, baj-oj lerte metis en ilin tradiciajn dancojn, tiel ke ili prezentiĝas pli vigle. La malnovaj taj-aj teatraĵoj estis prezentitaj nur per kantado sen gestado. Nun ili jam fariĝis viglaj kantodancoj kun granda arta infekto, sub akompanado de tamburo kaj aliaj muzikaj instrumentoj.

Iuj nacimalplimulto ja ne havis teatraĵojn en sia historio. Sed, kun disvolviĝo de iliaj popolaj kantodancoj kaj folkloraj literaturo aperis al ili teatraĵoj spegulantaj la realan vivon. La unua ji-a opero "Ŝafmekado en Noktomezo" prezentita en 1956 sorbis en si melodiojn de popolaj kantoj, movojn de popolaj dancoj kaj naciecan muzikon. Per ĝi oni komencis la historion

de la ji-a teatro. Poste aperis aliaj 30-40 teatraĵoj de tiu nacieco. Helpate de la kultura departemento de la popola registaro, ankaŭ mongoloj, mjaŭ-oj, hani-oj kaj aliaj naciecoj ekhavis siajn teatraĵojn. Krome, pompe ekfloris en la arta ĝardeno de la nacimalplimulto modernaj nacilingvaj dramoj, operoj kaj pluraktaj baletoj. Kreiĝis tiel grandaj dramoj kaj tragedioj, kiel mallongaj facilaj komedioj kaj operoj. Iliaj temoj estas elstaraj, iliaj enhavoj riĉaj, iliaj strukturoj novaj kaj stiloj malsamaj. Ili estas bone akceptataj de diversnaciecaj popoloj. La ĝuang-a opero "Tria Franjo Liu" estas bone konata en kaj ekster nia lando, kiu estas adaptaĵo de bela samtitola popola legendo. Ĝi spegulas ne

nur talentan junan kantistinon de la ĝuang-a nacieco, sed ankaŭ per kantoj donas sciojn pri produktado, vivo, astronomio, geografio kaj literaturo, kaj samtempe prikantas diligentecon, saĝecon kaj malcedeman batalspiriton kontraŭ maljusteco. La nombro de ĝiaj spektatoroj dum la 20 jaroj de ĝia prezentado atingis jam cent milionojn. Preskaŭ ĉiuj ĝuang-oj scipovas kanti kantojn el la "Tria Franjo Liu".

JUNAJ ARTISTOJ EN KRESKADO

En la unuaj dek jaroj depost la fondiĝo de la nova Ĉinio, en la tuta Ĉinio fondiĝis jam 60 ensembloj de diversaj naciecoj. Dum la pasintaj 30 jaroj Ĉinio jam sukcese starigis artan armeon de la nacimalplimulto dank' al kulturado de junuloj per veteranaj artistoj, artaj lernejoj kaj aliaj metodoj.

La mongola fama ludisto de ĉevalkapa muzikilo Serasi ĉie vagadis en sia juneco kaj lernis la arton de sia patro. Post la Liberiĝo li fariĝis membro de la konsilantaro de la Muzikista Asocio de Ĉinio. En la kunveno por celebri la 65-jaran jubileon de lia ludado, li varbis 7 disĉiplojn. La tibeta kantisto Wu Youlun, kiu povoscias la tibetan, han-an kaj ji-an lingvojn, ofte verkas popolajn kantojn kaj teatraĵojn de la tri naciecoj kaj ankaŭ povas lerte ludi multajn muzikilojn. Li estis multfoje invitita al Beijing por prezenti.

Por kulture dramo-aktorojn de la nacimalplimulto, la dramaj institutoj en Beijing kaj Shanghai funkciigis kursojn por nacimalplimultaj studentoj. La naciarta kurso de la Shanghai-a Konservatorio estas speciale

funkciigata por kantistoj kaj muzikiloludistoj de la nacimalplimulto. La tibeta kantistino Cedan Ĝolma, antaŭe servutolino, studis en la lernejo, kune kun siaj diversnaciecaj kolegoj debutis kun brila talento en la koncerto "Shanghai-a Printempo" kaj gajnis la honoran titolon de "nacia kantistino". Ankaŭ aliaj institutoj por nacimalplimulto en aliaj urboj kaj provincoj starigis artajn fakultatojn aŭ kursojn por tiu celo.

Krome oni ankaŭ uzas aliajn rimedojn por kulture novajn naciajn artistojn. La Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono establis artan armeon kun pli ol 8,000 personoj de 13 naciecoj per prezentaj aktivadoj. La Ensemblo de Interna Mongolio elbakis pli ol 300 novicojn de 6 naciecoj en prezentado. La ji-a juna kamparano Yang Shen, utiligante liberan tempon, verkis ĉ. 20 libretojn kaj fariĝis dramisto de la unua generacio de la ji-a nacieco.

Dum multaj jaroj la profesiaj artaj trupoj de ĉiuj nacimalplimulto prezentadis kaj en grandaj kaj mezaj urboj kaj en malproksimaj regionoj de nacimalplimulto. En la kvindekaj jaroj, naskiĝis sur la stepo de la Interna Mongolio la arta husaro "Ulanmuĉi", arta trupo el nur pli ol dek membroj. Ili prenis popularigon de arto kiel sian taskon kaj ĉiu el ili kompetentas por pluraj artoj. Tia trupo jam fariĝis bona ekzemplo por ĉiuj postlaboraj artaj trupoj de diversaj naciecoj. Multaj gubernioj, komunumoj kaj produktaj taĉmentoj en la regionoj de la nacimalplimulto starigis sian postlaboran artan ensemblon aŭ prezentartan grupon. Multaj artaj amatoroj aktive prezentas

sur scenejo kiel kantistoj kaj lerte laboras en produktado. En 1964 okazis en Beijing festivalo de la amatoraj artaj trupoj de la tutlandaj nacimalplimulto. En ĝi partoprenis pli ol 700 reprezentantoj el pli ol 50 naciecoj kaj prezentis pli ol 2,500 programerojn. Tiaj festivaloj ofte okazas en la regionoj de nacimalplimulto kaj ludas rolon en interŝanĝo de la nacia arto kaj revuado de amatoraj artaj trupoj.

Por plifortigi la nacian unuigon kaj la kulture interŝanĝon, la popola registaro kuraĝigis kaj organizis grandan nombron da han-aj artistoj por viziti la regionojn de la nacimalplimulto por lerni kaj prezenti. Iu Henan-opera trupo vivis en Tibeto 12 jarojn kaj faris pli ol 3,000 prezentojn sur la stepo kun neĝoŝtormo. La Ĉina Akrobata Trupo faris turneon sur la stepo de la Interna Mongolio kaj miloj kaj miloj da paŝtistoj unuafoje vidis mirindan akrobatadon.





SIMPOZIO PRI KORPUSKLA FIZIKO EN GUANGZHOU

En januaro, la Ĉina Akademio de Sciencoj okazigis Simpozion pri Korpuskla Fiziko en Guangzhou (Kantono). Ĝin ĉeestis 50 eksterlandaj sciencistoj kaj pli ol 100 ĉinaj sciencistoj, ĉiuj fame konataj. En tiu simpozio oni faris vastan sciencan interfluan pri korpuskla fiziko kaj rikoltis kontentigan frukton. Post la simpozio, ĉefministro Hua Guofeng kaj vicĉefministro Deng Xiaoping intervidiĝis respektive kun Tsung-dao Lee, Chengning Yang kaj aliaj entute pli ol 40 transmaraj sciencistoj, kiuj partoprenis en la simpozio.

LASTAJ EROJ DE LA ARTA FESTIVALO POR LA NACIA FESTO

En januaro, prezentiĝis en Bejing (Pekino) la lastaj eroj de la Arta Festivalo por la Nacia Festo de 1979. Tiu ĉi lasta prezentado, la 18-a en vico, inkluzivis 17 programerojn de dramoj, operoj, Pekinaj operoj, baletoj, muzikaj kaj dancoj. Inter la 6 dramoj, "La Torenta Flava Rivero" temas pri persona direktado de ĉefministro Zhou Enlai en batalo kontraŭ inundo en 1958 kaj priskribas lian intiman interligitecon kun la popolo, "Al la Ĉielo" priskribas epizodon en modernigo de nia popola aerarmeo kaj "Jianzhen Orienten" priskribas malfacilan vojaĝon de bonzo Jianzhen de Tang-dinastio (618-907 p. K.) al Japanio kaj lian neforgeseblan kontribuon al la amikeco inter Ĉinio kaj Japanio. Inter la operoj, baletoj kaj lokaj operoj, kun originala stilo, troviĝis la mondfama "Sinjorino kun Kamelio" kaj la moderna revolucia Pekina opero "Liu Zhidan".

KUNVENO DE LA ĈINA VERKISTA ASOCIO POR PLI VIGLA KREADO

Lastatempe, la prezidantaro de la Ĉina Verkista Asocio kunvenis por diskuti pri vigligo de literatura kreado kaj teoria kritikado. Ĝi decidis sendi verkistojn al la fronto de konstruado de la kvar modernigoj, por ke ili enprofundiĝu en la vivo kaj bone ĝin konu. En 1980, pli ol cent verkistoj iros laŭinvite al Heilongjiang (Hejlonggiang), Jilin (Gilin), Anhui, Gansu, Qinghai (Kinghaj) kaj aliaj provincoj por literatura kreado. Ĉirkaŭ la Novjara Tago de 1980, grupo da verkistoj veturis al Hainan-insulo, Xishuangbanna kaj aliaj lokoj por vizito.

La kunveno ankaŭ decidis fondi Komitaton por Protekto de Verkistaj Rajtoj, Komitaton de Kreado, Komitaton de Infana Literaturo, Komitaton de Junula Literatura Laboro, Komitaton de Nacia Literatura Komitato de Teoria Kritiko kaj Komitaton de Fremdlanda Literaturo respektive kun Xia Yan, Ding Ling, Yan Wenjing, Liu Baiju, Teyipzham (ujguro), Chen Huangmei kaj Feng Zhi kiel ĉefkomitatanoj.

GLITKURADO EN BEIHAI-PARKO

En la 13-a de januaro, okaze de la 800-jara jubileo de la fondiĝo de la nomita parko en Bejing, glitkurado de alivestitoj okazis sur ĝialaĝo kun cirklo 3 kilometrojn longa. Pli ol 200 glitkuraj amatoroj prezentis sian arton. Oni prezentis sur la sketejo diversajn popolajn dancojn, kiel drakodanco, leondanco, surtera boato, *jango*-danco kaj azenrajdo. Aparte amuza estis la surglacia ludo "Aglo kaj Kokidoj", en kiu la emeritaj geedzoj Lu Hongyi (61-jara) kaj Na Jinghua (56-jara) rolis respektive kiel aglo kaj kokino kaj 20 4-5-jaraj infanoj kiel kokidoj, kaj ili faris multajn danĝerajn movojn.

SENSACIA PREZENTADO DE OPERA TRUPO EN SHANGHAI

Per sia 45-taga prezentado en Shanghai (Sanhajo) la Pekinopera Trupo de Huaiyin de Jiangsu (Giangsu)-provinco faris sensacion en tiu plej granda urbo de Ĉinio. Dum ĝia prezentado de la operoj "Servantino Hongniang", "Almozulino Jin Yunu" kaj aliaj, la teatro forvendis siajn ĉiutagajn biletojn. Spektatoroj diris kun admiro, ke ili estas veraj artaĵoj. Ĝia ĉefa aktoro Song Changrong lernis sian arton de Xun Huisheng, kiu estis unu el la kvar plej famaj aktoroj, kiuj ludis rolojn de junaj virinoj. Song bone heredis la originalaĵojn de la Xun-skola prezentarto en kantado, parolo kaj gestado kaj faris ian disvolvon al la heredaĵo kaj montris sian eminentan arton en prezentado de pensoj kaj sentoj de la luditaj roloj per okulmovoj, mangestoj kaj paŝmanieroj.

22 ORAJ MEDALOJ GAJNITAJ DE ĈINAJ PAFISTOJ

En la Dua Azia Ĉampioneca Pafkonkurso por Virinoj kaj Junuloj, la Kvara Azia Ĉampioneca Pafkonkurso kaj la Unua Azia Ĉampioneca Diskopafa Konkurso okazintaj en Manila, la ĉina pafista teamo kun 35 gesportistoj gajnis 22 orajn, 7 arĝentajn kaj 2 kuprajn medalojn kaj kreis 13 aziajn rekordojn en la konkursoj de 38 disciplinoj.



Pajleja strigo (*Tyto capensis*)

La nomita strigo estas rara birdo trovita en la naturo-rezervejo en Wuyi-montaro, Fujian-provinco, Ĉinio kaj manĝas ĉefe kampo-musojn.


Ĝia vizaĝo aspektas kiel tiu de simio kaj ĝia korpo kiel tiu de aglo. Specialistoj pri birdoj konstatis, ke tiu birdo estas utila birdo.

Rano kun kvar kornoj

Tia rano, same kiel ordinaraj ranoj kaj bufoj, estas amfibio. Antaŭ pli ol 50 jaroj oni unuafoje trovis ĝin en Wuyi-montaro de Ĉinio. Ĝi estas unu el la raraj animaloj en la mondo. Ĉe ambaŭ supraj lipanguloj de tia virrano troviĝas po paro da nigraj kornoj. La supra parto de ĝia sklero estas flavaverda kaj la malsupra bluapurpura. Ĝiaj pupiloj povas ŝanĝiĝi en grandeco laŭ intenseco de lumradioj. Aŭtune ĝi metas ovojn kaj post unumonata kovado eloviĝas idoj. La idoj maturiĝas post du vintroj.

Ranino (maldekstre) kaj virrano (dekstre): ovoj (supre) kaj ranido (sube)






Envazaj miniaturaj majstro de

La envazaj miniaturaj pejzaĝoj de Ĉinio estas nomataj “poemoj senvoĉaj” kaj “pen-traĵoj tridimensiaj”. La urbo Suzhou havas plej longan historion de tiu arto. La envazaj pejzaĝoj estas faritaj ĉefe el radikoj de ulmoj, granatarboj, umearboj kaj aliaj. Tiuj artaĵoj impresas per antikveco, originaleco kaj okulplaĉeco.

Kiam oni aprecas belajn kaj variajn envazajn pejzaĝojn, oni certe pensas pri farantoj de la artaĵoj. Zhu Jinyuan estas unu



pejzaĝoj kaj ilia tiu arto

el la majstroj de tiu arto. Dank' al sia multjara praktikado, li heredis, riĉigis kaj disvolvis tiun arton de nia lando. Liaj artaĵoj ĉefe el arboradikoj karakteriziĝas per antikveco kaj kuriozeco. En elektado de radikoj li tre atentis belecon de iliaj ĉefaj partoj.

En la lastaj jaroj li sukcese greftis arhatokaj kvinpinglo-pinojn sur aliajn trunkojn kaj per tio faris novan kontribuon en progresigo de la Suzhou-a envaza arto.



Zhu Jinyuan (maldekstre)



Ŝeng* en Pekina

Opero



Laŭŝeng



Sjaŭŝeng



Vuŝeng

Unu el la scenoj de la pekina opero "Ruzo kun Malplena Urbo" kun *laŭŝeng* kiel ĉefrolulo



Originala floro de arto

EN Beijing (Pekino) troviĝas Centra Nacia Ensemblo, kiu estas originala floro de arto. Tiu ensemblo konsistas el ĉ. 300 kantistoj, dancistoj kaj muzikistoj de 28 naciecoj. Ĝia repertuaro devenas de popolaj kantoj kaj dancoj de diversaj naciecoj, forte impresas per naciaj stiloj kaj lokaj koloroj kaj estas miniaturo de la kanta kaj danca arto de la ĉinaj naciecoj.

Antaŭ nelonge, mi vizitis tiun ensemblon. Ĝia vicdirektoro Boyinbatu estas mongolo. Li diris al mi: “Ĉinio estas lando kun multaj naciecoj, vivas en ĝi pli ol 50 nacimalplimulto kun han-nacieco. Ili havas tre riĉan repertuaron de kantoj, dancoj kaj muzikaĵoj. De post sia fondiĝo en 1952, la Centra Nacia Ensemblo ĉiam sin dediĉas al disvolvado de la kanta-danca arto de la nacimalplimulto kaj akcelado de kultura kaj arta interfluo inter la naciecoj.”

Kiam ni estis interparolantaj, aŭdiĝis agrabla muziko. Ĝi kondukis min en helan ekzercan ĉambrom, kie uĝura tamburinis-to estis sin ekzercanta pri tamburina solo “Riĉa Rikolto”. Per la varianta tamburina muziko kaj gestoj, li prezentis la ĝojon de uĝuraj kamparanoj dum rikoltado. Ĉe alia angulo de la ĉambro, mongola kantisto

Zhambul estis sin ekzercanta pri popola kanto de la stepo. La sonora kantado kun malrapida ritmo sentigis al ni la vivetoson de vasta stepo.

La Interna Mongolio estas delonge konata kiel “Maro de Kantoj”. La mongola popolo estas lerta en kantado kaj dancado. Zhambul, deveninta de la vasta stepo Hulun Boir, ŝatas kanti de sia infaneco, kaj en sia 14-jara aĝo li jam fariĝis profesia kantisto. Lia kantado karakteriziĝas per entuziasmeco, simpla sincereco kaj intensa etoso de stepo. Plejparto de la kantoj prezentitaj de li estas verkita de li mem, kaj multaj el ili vaste cirkulas sur la stepo.


Kaj mi vidis tie ankaŭ tibetan danciston Oumijianzan, kiu estis prove ludanta la tibetan dancan “Ĵeba sur la Stepo”, kreitan de li kaj lia kolego. “Ĵeba” estas speco de kanto-danco ludata de la pasintaj tibetaj migrantaj artistoj. La danco de Oumijianzan prezentas la feliĉan vivon kaj ĝojon de tibetaj servutuloj post ilia liberiĝo.

Kvankam Oumijianzan jam estas 50-jara, tamen lia dancado estas saturita de viveco. Liaj paŝoj malpezaj kaj liaj movoj fortaj estis multe laŭdataj de la spektatoroj.

Oumijianzan naskiĝis en servutula familio. Li sklave servis en lamaisma templo, kiam li ankoraŭ estis infano. Li forfuĝis el ĝi en sia 14-jara aĝo kaj komencis vivon de vagabondo. Li ellernis la arton de “ĵeba” kaj komencis sin vivteni per tiu arto. En 1953, li estis akceptata de la Centra Nacia Ensemblo kiel dancisto. Ankaŭ lia edzino laboras en la ensemblo kiel kostumistino. De tiam, lia talento disvolviĝis bone kaj radikale ŝanĝiĝis liaj politika pozicio kaj vivstato. Nun li estas koregrafo-direktanto de la ensemblo kaj membro de la konsilantaro de la Ĉina Dancista Asocio. Li plurfoje vizitis fremdajn landojn por prezentado. Li verkis kaj rearanĝis multajn naciajn kanto-dancojn kaj faris kontribuon al disvolvo de la dancarto de la tibeta nacieco.

Similan pasintecon travivis mjaŭ-a dancisto Jin Ou, kiu estis mizera bovpastisto en sia infaneco. Post aliĝo al la ensemblo en 1952, li diligente studadis kaj heredis la dancarton de sia nacieco kaj faris sian kontribuon en ĝia disvolviĝo. La “Danco de Mjaŭ-aj Gejunuloj” aranĝita de li kaj lia han-nacieca kolego estis filmigita.

En la pasintaj pli ol 20 jaroj, la Centra Nacia Ensemblo ne



Lernado de veterana artisto

nur faris prezentadon en urbaj teatroj, sed ankaŭ sendis malgrandajn ensemblajn trupojn al fabrikoj, vilaĝoj kaj regionoj loĝataj de nacimalplimulto por regali tieajn popolanojn per sia arto. Ĝi plurfoje vizitis landojn en Azio, Eŭropo kaj Ameriko por prezentado.

En la pasinteco, ĝiaj membroj kolektis grandan kvanton da popolaj dancoj diversnaciecaj kaj kreis multajn belajn programerojn. La koregrafoj-direktantoj kaj aktoroj de la ensemblo ĉiuj konas la veron, ke la vivo estas la fonto de la artoj. Ĉie, kie ili aktivis, ili intime kunvivis kun lokaj popolanoj. Foje, iu dung-a maljunulo informiĝis, ke la ensemblo alvenis de Bejing al Guizhou, li kaj liaj familiaj tuj veturis ĉ. 200 kilometrojn al la loko por vidi ĝiajn mem-

brojn, kiuj foje loĝis ĉe ili. Tia sincera amikeco stimulas la kreadon de la artistoj. Han-nacieca muzikisto Mai Ding kaj ji-nacieca popola muzikisto Jin Guofu kune kreis la kanton "Bonvolu Resti Malproksima Gasto", kiu tre plaĉas al la amasoj. Ĝia bela kantoteksto kaj lirika melodio bone montras la gastamon de ĉinaj nacimalplimulto:

Jen floroj apudvojaj ĉarme ridas,

kaj fruktoj jam maturaj nin incitas.

Ho, gasto malproksima, restu ĉe ni,

la olda Guishan-monto ĝoje vin invitas.

Grasegas jen dombrutoj sur la montdeklivo:

En vesperruĝo tuj revenos paŝtknabinoj.

Ho, gasto malproksima, restu ĉe ni,

ke kune kantu ni pri l' estonteco de l' patrio.

La ĥoro estis plenumita de pli ol 50 gekantistoj en diversnaciecaj kostumoj. Ili plurfoje ĝin prezentis en amuzvesperoj aranĝitaj por fremdlandaj gastoj. Kvankam la alilandaj geamikoj ne komprenis la tekston, tamen ili varme aplaudis pro la bela kortuŝa melodio. Tiu kanto estis prezentita en la Monda Junulara Festivalo en 1956 kaj gajnis oran medalon. Ĝia teksto estas jam tradukita en la anglan kaj francan lingvojn.

Dum mia vizito al la ensemblo, mi profunde sentis, ke ĝi estas granda familio plena de ĝojo. Ĝiaj membroj de 28 naciecoj kun malsamaj lingvoj kaj vivkutimoj kunvivas en harmonio kaj solidareco. Ĉu en provludo de novaj programeroj fare de aktoroj aŭ en diskutado de komponistoj pri heredado de nacia muziko, la partoprenantoj ĉiam libere esprimas siajn opiniojn kun respekto unu al alia. Korea nova talenta dancistino Xin Sunnjo diris kortuŝe, ke komuna idealo kunligas la ensemblanojn kaj la reciproka prizorgado en la ĉiutaga vivo faras la grandan familion plena je varmece.

Krom plenumado de programeroj de la respektivaj naciecoj, la aktoroj de la ensemblo plenumas ankaŭ programerojn koncernajn al pluraj naciecoj. Kiam ili renkontas lingvajn malfacilojn, ili ofte interŝanĝas siajn pensojn per la artaj lingvoj de muziko kaj danco. Nun multaj el ili jam scias la hanan lingvon pro longa intima kunlaborado.

Kiam ujugura komponisto Usmanzhang aliĝis al la ensemblo, li ne sciis la hanan lingvon nek povis registri melodiojn per signaro. Dum kunlaborado kun han-a komponisto Yu Lichun, ili lernis unu de la alia kaj fariĝis intimaj amikoj. Sub la helpo de Yu Lichun, Usmanzhang mastris muzikan teorion kaj komponajn teknikojn, dum Yu Lichun akiris pli multajn sciojn pri la ujugura muziko. “Printempo ĉe Tianshan-montaro” kaj multaj aliaj kantoj kune verkitaĵoj de ili estas tre ŝatataj de la popolamasoj.

Kiam mi vizitis la ensemblon, ĝiaj artistoj estis en streĉa provludado por veturi, en tri taĉmentoj, al malproksimaj landlimaj regionoj loĝataj de nacimalplimultoj por prezentado.



Jeba sur Stepo

La Beijing-a Fabriko de Naciaj Muzikiloj

EN nacia koncerto preskaŭ mil aŭskultantoj estis absorbitaj de la muziko “Printempo ĉe Tianshan-montaro” ludita de bivisto. Oni sentis sin kvazaŭ veninta al la piedo de Tianshan en Xinjiang (Hingiang) kaj ĝuanta ĝian belan pejzaĝon . . .

La kurteno malrapide falis en varma aplaŭdado. Oni miris, kial antikva bivo, kies sono estis ne tiel granda, povas eligi tiel laŭtan sonon kun tembro tre pura kaj bela.

Ĝi estas elektronika bivo nove fabrikita de la Beijing (Pekin)-a

Fabriko de Naciaj Muzikiloj. Oni pligrandigis ĝian sonon sen ŝanĝo de la tembro de la tradicia bivo, tiel ke ĝi povas ludi modernajn kaj antikvajn muzikaĵojn de Ĉinio kaj aliaj landoj kaj imiti liuton kaj gitaron. Tiu reformo malfermis vojon por renovigo de la ĉinaj naciaj muzikiloj.

La ĉinaj naciaj muzikiloj de multaj specoj havas longan historion. Frue antaŭ 3,000 jaroj estis jam 12 specoj de naciaj muzikiloj kaj en la dua jarcento a. K. pli ol 80 specoj. Nun ĉir-

kaŭ 200 specoj de naciaj muzikiloj estas uzataj de la popolo. Al tiuj muzikiloj oni faris reformojn en malsamaj gradoj post la fondiĝo de la nova Ĉinio.

Iun tagon en frua printempo mi venis al la Beijing-a Fabriko de Naciaj Muzikiloj. Ĝia sesetaĝa domo estas konstruata apud la malnova. Fabrikestro He Huiquan diris, ke somere de la kuranta jaro la fabriko translokiĝos en la novan domon el ĉiuj siaj 27 laborpunktoj.

He diris, ke antaŭ la Liberiĝo la naciaj muzikiloj de Beijing

estis faritaj kaj riparitaj de familiaj metiejoj aŭ individuaj metiistoj. La grandaj metiejoj havis po dekelkajn laboristojn kaj la malgrandaj nur po 3 aŭ 4. La plej granda metiejo havis historion de centoj da jaroj, sed ĝi ne prosperis. Tiam la muzikinstrumentoj estis mane faritaj per tranĉiloj kaj ĉiziloj. En la malnova socio la aktoroj estis malestimataj kaj la faristoj de muzikinstrumentoj servantaj al ilia arto havis ankoraŭ pli malaltan socian pozicion. Ili loĝis dise kaj iuj metiejoj servis samtempe kiel loĝejoj de metiistoj.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, la popola registaro tre atentis faradon de naciaj muzikiloj, prenante ĝin kiel gravan parton por disvolvi la nacian arton de kanto kaj danco. Unue ĝi organizis individuajn metiistojn en kooperativojn por kolektiva produktado. En 1956 la disaj malgrandaj metiejoj estis kunigitaj en la Beijing-an Fabrikon de Naciaj Muzikiloj, kaj granda parto de ili translokiĝis en unu saman fabrikdomon, sed malgranda parto de ili ankoraŭ

restis disa en produktado. La ĉinaj naciaj muzikiloj, laŭ la tradicia kutimo kaj iliaj karakterizaĵoj, povas esti klasifikitaj en 4 grupoj, nome la blovaj, arĉaj, plukaj kaj perkutaj instrumentoj. Akompanate de fabrikestro He, mi pririgardis la laborejojn de instrumentoj de la unuaj tri specoj.

La blovaj instrumentoj estas faritaj el bambuaj aŭ lignaj tuboj. Al tiu grupo apartenas *diz-o* (bambua fluto sen klapoj), *gŭanz-o* (simpla klarneto kun duobla anĉo, sen klapoj), *ŝeng-o* (harmoniko kun bambuaj tuboj), *ŝjaŭ-o* (vertikala bambua fluto kun blovtruo ĉe la supra fino, sen klapoj) kaj surnao (simpla hobojo sen klapoj). En la laborgrupo de *ŝeng-o* iu laboristino estis kontrolanta la tembron de *ŝeng-o*. Provante ĝiajn tonojn, ŝi reguligis ĝiajn anĉojn. *Ŝeng-o* estas unu el la plej antikvaj anĉaj blovinstrumentoj de nia lando. La tradiciaj *ŝeng-oj* havas 13 aŭ 14 anĉojn, kovras nur malvastan skalon kun nekompletaj duontonoj kaj ne kapablas libere ŝanĝi

tonalon. Post reformado al la malnova *ŝeng-o* kreiĝis 24-anĉa *ŝeng-o* por solo kaj 22-anĉa *ŝeng-o* por akompano. Ilia skalo estas vasta, ilia tembro ĉarma kaj ilia tonalsanĝo facila.

La ĉefaj arĉaj muzikiloj estas la dukordaj arĉinstrumentoj *erhu-oj*, *ĝinghu-oj* kaj *banhu-oj*. La *ĝinghu-oj* kaj *banhu-oj* produktitaj de tiu fabriko estas kvalite avangardaj en la tuta lando dum multaj jaroj. *Ĝinghu-o* kun akutaj kaj ĉarmaj tonoj estas uzata por akompani pekinoperajn kantojn. La sonkesto kaj stangeto de *ĝinghu-o* estas faritaj el bambuoj multjare konservitaj. Al ĝia cilindra sonkesto instaliĝas stangeto kun du kordoj, inter kiuj moviĝas la arĉo por produkti sonojn per frotado. Altklasa *ĝinghu-o* estas tre zorge farita. Iu majstro de la fabriko havas 4 *ĝinghu-ojn* hereditajn de la familio, kiuj povas akompani ĉiujn kantojn de la pekina opero. Ili estis faritaj el raraj arhataj bambuoj konservitaj dum pli ol 250 jaroj kaj bonkvalita boao-haŭto. Ĝia sono estas pura, bela, ne-orelpika proksime kaj aŭdebla fore. Laŭ takso de famaj ludantoj de la instrumento, ĉiu lia *ĝinghu-o* valoras dek mil usonajn dolarojn.

Dum vizitado al Ĉinio nemalmultaj fremdlandaj muzikistoj ŝatis aĉeti kelkajn ĉinajn naciajn muzikilojn kiel memoraĵon. *Erhu-o*, kiu estas forme simila al kaj iom pli granda ol *ĝinghu-o* kaj povas ludi kantomelodiojn, estas ilia preferaĵo.

La plukaj instrumentoj taŭgas por ludi viglajn melodiojn kun klaraj taktoj. Bivo estas grava pluka instrumento de nia lando. Ĝi aperis antaŭ la 2-a jarcento a. K., kaj en la 6-a jarcento p. K. ĝi jam estis vaste uzata kaj

Farado de bivo







Provado de ŝeng-o

disvolviĝis en muzikilon por solo. La kapo kaj korpo de bivo estas faritaj el palisandro. Ĝia supra parto estas maldika kaj mallarĝa, dum ĝia malsupra parto, nomata ventro, estas pli larĝa. La ventro garnita per maldika lignoplato el ĉina sunombrela arbo (*Firmiana simplex*) servas kiel sonkesto. Al la sonkesto instaligaŝ kvar kordoj. Dum ludado oni plukas la kordojn per fingroj de la dekstra mano kaj premas ilin per tiuj de la maldekstra mano. Bivo havas

relative riĉan esprimivon. Ĝi povas ludi kaj belajn lirikajn ariojn kaj ardajn imponajn muzikaĵojn. Fabrikestro He diris al mi, ke la kovro de la sonkesto devas esti farita el la nomita ligno, ĉar ĝi estas malpeza, kontraŭhumida kaj bona en resonado. Iu maljuna laboristo konigis al mi rakonton: En antikveco estis fama ludanto de sepkorda plukinstrumento Yu Boya. Foje dum veturado per ŝipo li konatiĝis kun arbohakisto Zhong Ziqi. El la

ludado de Boya, Ziqi komprenis lian noblan aspiron, kaj ili fariĝis bonaj amikoj. Poste Ziqi mortis de malsano. Boya perdis sian amikon, kiu plej bone komprenis lian muzikon, kaj en ekstrema malĝojo li ĵetis la muzikilon kontraŭ sunombrelan arbon. Je tio la arbo eligis grandan bruon. Poste oni uzas la lignon de tia arbo por fari kovron de bivo pro ĝia laŭta resono.

En farado de naciaj muzikiloj necesas alta teknologio. Krom instalo de speciala fako por esplori kaj reformi muzikilojn, la gvidantoj de la fabriko ankaŭ mobilizas teknikistojn kaj laboristojn por renovigi la teknikon. En la lastaj jaroj ili projektis kaj fabrikis pli ol 180 maŝinojn, kiuj ne nur liberigis la faristojn de peza fizika laboro, sed ankaŭ multe altigis la kvanton kaj kvaliton de la produktaĵoj. Nun la fabriko havas pli ol 500 laboristojn kaj produktas pli ol 120 specojn de la naciaj muzikiloj. Zimbalono, bivo, *ginghu*-o, *erhu*-o k. a. produktitaj de la fabriko vendiĝas ne nur en Ĉinio sed ankaŭ en pli ol 30 fremdaj landoj kaj estas laŭdataj de enkaj eksterlandaj muzikistoj.



Jingdezhen — urbo de porcelanaĵoj

de nia raportisto

WEN TIANSHENG



Kuranta cervo (porcelana figuro)

EN pasaĝera halo de la Bejing-a Internacia Aerodromo estas granda kolora porcelana fresko “Kanto de Arbaro”, kun longeco de 20 metroj kaj alteco de 3.4 metroj. Ĝi estas kunmetita el 3,000 koloraj kaheloj. La grandioza bildo portis nin en arbaron de suda Ĉinio: en ĝi flugas sennombraj belaj birdoj, en la malproksimo falakvo falas kvazaŭ de la ĉielo kaj en la proksimo fluas klara akvo. La bildo montras, ke taj-oj en festaj kostumoj celebras riĉan rikolton.

Tiu porcelana fresko estas farita de 36 porcelanaj artistoj de Jingdezhen laŭ la origina verko de fama pentristo Zhu Dalian. Post plurfoja bakado la porcelana bildo ricevis brilkolorajn nuancojn kaj gajnis admiron de ĉinaj kaj fremdlandaj rigardantoj.

Porcelanaĵo estis granda eltrovo de antikvaj ĉinaj laboruloj. Jam delonge Ĉinio estis nomata lando de porcelanaĵoj kaj Jing-

dezhen estas fama urbo de porcelanaĵoj de Ĉinio. Ĉi tie abundas kaolino, kaj porcelanaĵoj faritaj el ĝi estas blankaj kaj tiel malmolaj, ke eĉ akra tranĉilo ne povas difekti ilian surfakon. La tradiciaj porcelanaj produktaĵoj de Jingdezhen estas faritaj, de preparado de kruda materialo ĝis bakado, per aparta teknologio. Ĝiaj bluaj-blankaj porcelanaĵoj estas raraĵoj de porcelana teknologio. Komplete de 176 porcelanaj manĝiloj kun bluaj desegnoj sur blanka fono eksponitaj en ekspozicio de 1979 estis premiita de la ŝtato per ora medalo. Tiu porcelanaĵo estas kristale brilaj kaj okulplaĉaj, admirataj de ĉinaj kaj fremdlandaj porcelanaj ekspertoj kiel perloj el la porcelanaĵoj. Ili estas atutaj produktaĵoj de Jingdezhen.

VIZITO AL JINGDEZHEN

Ravite de la porcelanaj freskoj kaj la belaj tradiciaj porcelanaĵoj, multaj eksterlandaj

amikoj kaj turistoj iras viziti Jingdezhen.

Komisiite de la redakcio de EPĈ, ankaŭ mi veturis al Jingdezhen.

La urbo distancas de Beijing ĉ. 2,000 kilometrojn kaj situas sur la bordo de Chang-rivero en Jiangxi (Gianghi)-provinco de sudorienta Ĉinio. Ĝi estas pitoreska urbo ĉirkaŭata de montoj.

Enirinte en la urbon, mi vidis multajn butikojn de ceramikaĵoj. Surstrate multaj homoj el malproksimaj lokoj preskaŭ senescepte kunportas porcelanaĵojn. Ankaŭ la veturiloj plejparte portas porcelanaĵojn. Ambaŭflanke de la stratoj estas ankaŭ tiaj butikoj, kiuj pakas porcelanaĵojn por klientoj kaj faras por ili pentraĵojn aŭ skribaĵojn sur porcelanaĵoj. En la urbo troviĝas ĉ. 80 grandaj kaj malgrandaj fabrikoj de porcelanaĵoj. En 1979 ili produktis pli ol 250,000,000 pecojn da porcelanaj skulptaĵoj, pendteleroj, tetrinkiloj ktp., kies valoro

konsistigis ĉ. duonon de la totala industria produktovaloro de tiu urbo. Iu Jingdezhen-ano diris fiere: "Sesono de la 230,000 loĝantoj de nia urbo okupiĝas pri porcelanaj laboroj."

Oni diris: En Han-dinastio antaŭ ĉ. 2,000 jaroj, tiu ĉi loko nomiĝis Xinping. Oni konstruis bakujojn tuj apud montoj por fari porcelanaĵojn. Sed tiamaj produktaĵoj estis maldelikataj en formo kaj kvalito. En Tang-dinastio, oni ŝatis tetrinkadon, kaj porcelanaj laboristoj iom post iom trovis teknologiojn por baki porcelanajn tetrinkilojn per alttemperatura fajro. Kaj la produktaĵoj portis la koloron de blanka jado. En la 11-a jarcento p. K. imperiestro de Song-dinastio Zhao Heng tre ŝatis tiulokajn porcelanaĵojn kaj ordonis, ke la suba surfaco de ĉiuj imperiestraj porcelanaĵoj surhavu la vortojn "farita en Jingde-erao". De tiam, tiu ĉi loko portas la nomon Jingdezhen (zhen en la ĉina lingvo signifas urbeton).

En antikva tempo, arabaj kaj eŭropaj komercistoj ofte aĉetis porcelanaĵojn de tiu loko kaj transportis ilin al siaj landoj tra la silka vojo en nordokcidenta Ĉinio. La fama ĉina navigisto Zheng He sepfoje navigis foren, kunportante porcelanaĵojn de Jingdezhen al landoj de la suda kaj okcidenta Azio kaj la orienta Afriko.

En la periodo de la fino de la 19-a jarcento ĝis la fruaj jaroj de la 20-a jarcento, Ĉinio falis en duonkoloniecon. Kruele ekspluatate de la putra registaro kaj avidemaj komercistoj, porcelanaj artistoj kaj bakistoj vivis mizere. La porcelana produktaĵo de Jingdezhen estis en depresio ĝis la Liberiĝo.

Mi vizitis la Ceramikan Kompanion de Jiangxi (Gianghi)-provinco kaj ĝiajn grandajn fabrikojn de porcelanaĵoj. En la fabrikoj mi propraokule vidis, ke la laboristoj faras ajuradon, glazuradon, formigon ktp. En la Jianguo-a Fabriko de Porcelanaĵoj troviĝas baktunelo hejtata per oleo kaj regata per elektro. Tia bakujo anstataŭos la malnovtipajn. Cetere oni aplikis

ŝprucigadon, presadon, gluadon por havigi desegnojn al ĉiutagaj porcelanaĵoj por anstataŭi man-desegnadon.

EN ARTA PALACO

Dum la vizito ni trovis ke la projekta ĉambro kaj eksponejo de ĉiu fabriko de porcelanaĵoj similas al arta palaco, kie eksponeblas porcelanaj skulptaĵoj kaj

Wang Guiying projektas novajn porcelanaĵojn.



Pan Wenfu kaj lia edzino



koloraj pentraĵoj kun historiaj kaj mitaj personoj kiel la enhavo, kies produktado estis ĉesigita en la kultura revolucio. Mi estis ĉarmita de la skulptaĵo "Chang'e Sopiras la Homan Mondon". Artistoj prenis la feinon Chang'e el ĉina populara mito kiel sian temon. Ŝi forflugis en la lunon ŝtele englutinte senmortigan pilolon kaj poste pentis dezirante reveni al la homa mondo. La skulptaĵo montras, ke Chang'e rigardas malsupren kun la mentono apogata sur mano. Iu fremda amiko absorbiĝis en rigardado kaj murmuris: "Jen orienta Venuso, belega!"

Poste oni turnis sian rigardon al junulina busto skulptita de juna artisto. La helruĝa sario sur ŝia kapo ŝajnas teksita, sed efektive estas skulptita kaj bakita porcelanaĵo. Fari saron el kaolino estas tre malfacile. La maldika sario kun sennombraj truetoj estis farita per tradicia ajurado. Tio montras, ke porcelana skulptaĵo povas vivece prezenti objekton laŭ volo de homo.

Porcelana manĝilaro kun bluj desegnoj premiita de la ŝtato per ora medalo



La eksponataj kolore glazuritaj porcelanaĵoj estis multe admirataj de la rigardantoj. Ni rigardis porcelanaĵojn en ruĝa, helblua kaj kristala glazuro. La kristala glazuro plenigis la brilan surfacon de porcelanaĵoj per kristalaj floroj.

Respondante nian demandon pri sanga glazuro rara kaj malfacile bakita, la mastro rakontis al ni miton: "Iu imperiestro trovis, ke la bildo de lia ruĝa robo spegulita sur blanka porcelanaĵo estas tre bela. Li ordonis, ke laboristoj baku, en limigita tempo, porcelanaĵojn kun tia kolora glazuro, kaj se ili fuŝos, ili estos pune mortigitaj. La bakisto plurfoje bakis, sed malsukcesis. Antaŭ la templimo, filino de iu laboristo, por savi la vivon de sia patro, saltis en la flamantan bakujon por ĝin kulti. Tio kortuŝis dion kaj la porcelanaĵoj en la bakujo surportis sangan koloron. Kvankam tio estas mito, tamen ĝi montras, ke la porcelana arto de Jingdezhen estas kristaliĝo de saĝo kaj laboro de la porcelanaj laboristoj.



Baletistino (porcelanaĵo)

FAMILIO DE PORCELANAJ LABORANTOJ

En la Fabriko de Porcelanaj Artaĵoj ni vidis multajn veteranajn artistojn. La popola registaro tre zorgas pri ilia vivo kaj donis al ili titolon de metiartisto. Ili nun fervore instruas sian esoteran teknikon al junaj laboristoj.

En la fabriko ni vidis la 42-jaran porcelanan artiston Pan Wenfu. Li kaj lia edzino Tian Huidi prove faras imitaĵojn de antikva kruĉo. Lia patro estas fama porcelanajisto, liaj du fratinoj estas specialistoj de receptado kaj bakado kaj liaj du fratinoj estas porcelanaj teknikistinoj. Ilia familio estas vere tipe porcelanista.

Lastatempe, Pan Wenfu kreis surbotelan pentraĵon "Printempa Pluvo" per koloraj glazuroj antaŭe uzeblaj nur unuope. La bildo prezentas nigrajn hirundi-

dojn kaj blankajn pirflorojn sur kolora fundo, kaj ĝia poezia gusto ricevis laŭdojn de ekspertoj.

TROVEMA ARTISTINO

En la Jingdezhen-a Scienca Instituto de Porcelana Industrio, mi intervjuis kamaradinon Wang Guiying. Ŝi estas eminenta specialistino de porcelana tekniko kaj kvieta mezaĝulino, estrino de la arta fako de la instituto. Kiam mi vidis ŝin, ŝi tenis, sur manplato, bovlon kun dikeco de malpli ol 0.5 milimetro kaj esploris pejzaĝan pentraĵon sur ĝi.

Tia maldika bovlo karakteriziĝas jene: maldika kiel papero,

blanka kiel jado, brila kiel spegulo kaj sonora kiel tintilo. La pejzaĝo pentrita sur la diafana bovlo estas vere bela.

Wang Guiying devenis de familio de porcelana pentristo. Ŝia patro Wang Yeting estis unu el la ok famaj pentristoj de la urbo, lerta en pentrado de naturaj pejzaĝoj. Por disvolvi novan plastikon de porcelanaĵoj, ŝi ofte rigardis bildfilmojn por riĉigisian imagpovon. Dank' al observado de la vivo, ŝi ricevis inspiron de elegantaj verdaj bambuoj kaj projektis bambuformajn vazojn kaj tiuj produktaĵoj trovis bonan merkaton. En antikva Ĉinio popolanoj kutimis uzi kalabasojn por enteni

vinon, kaj laŭ tiu tradicio ŝi projektis kalabasajn vinujojn, ankaŭ tiuj produktaĵoj kun nacia stilo estis facile venditaj. Antaŭ nelonge la porcelana pentraĵo "Pejzaĝo de Huangshan" farita de ŝi estis multe laŭdata de japanaj amikoj.

Ankaŭ ŝia 16-jara filo ŝatas porcelanan pentradon. Antaŭ nelonge, tiu junulo partoprenis en la pentrado de la granda kolora porcelana fresko "Jinggangshan-monto", sub la gvido de porcelana artisto Zhang Songmao. Tiu bildo kun longeco de 7 metroj kaj larĝeco de 4.2 metroj dekoracios la Popolan Halon de Beijing.

ZHE GONGQIN:

Vizito al kampara foiro

EN Zhaoxian-gubernio de Hebei-provinco je 300 kilometroj sude de Beijing (Pekino) sin trovas mondfama ŝtona arkoponto Zhaozhou-ponto. Tiu impona kaj eleganta ponto staras super la torenta Jiaohe-rivero. Ĝia arko larĝas je 37.37 metroj kaj altas je 7.23 metroj. Sur la ĉefarko troviĝas 4 arketoj, kiuj ne nur malpezigis la korpon de la ponto sed ankaŭ povas faciligi trapason de la fluo en inunda sezono. Tiu ponto estis konstruita antaŭ pli ol 1,300 jaroj, je 1,200 jaroj pli frue ol la apero de la unua samtipa ponto en Eŭropo. Ĝi estis provita de diluvoj kaj tertremoj, kaj nun ĝi ankoraŭ restas solida. En la jaro 1979, turistoj el FRG,

Usono, Japanio kaj aliaj 6 landoj vizitis ĝin, kaj multaj fremdaj gastoj alte taksis la solidan strukturon kaj lertan arkitekturon de tiu konstruaĵo kaj laŭdis la saĝon de la laboranta popolo de la antikva Ĉinio.

En la tago, kiam mi iris pri-rigardi tiun ponton, ĝuste okazis kampara foiro tie, kaj ĝi tre interesis min. En brila aŭroro mi venis al la foirejo ĉe la ponto kaj vidis, ke alvenas al ĝi kamparanoj el la ĉirkaŭaĵo kunportante siajn produktaĵojn kiaj kokoj, ŝafoj, kunikloj, brasikoj, jujuboj, tabako, porkidoj, objektoj plektitaj el herbo ktp. per portvektoj, ĉevalĉaroj aŭ bicikloj.

Ĉe Zhaozhou-ponto foiro okazas je ĉiu kvina tago. La foira administracio difinis tri stratojn kiel tri foirajn distriktojn: en la suda vendiĝas grenoj kaj furaĝoj; en la meza kortobirdoj, legomoj, bambuaj kaj lignaj objektoj kaj mebloj, matoj k.a.; kaj en la norda malgrandaj agrikulturaj instrumentoj kaj ŝarĝbrutoj. Larĝa strato suda-norda kun multaj ŝtataj butikoj interligas tiujn tri stratojn. Ĉe tiu strato troviĝas ankaŭ multaj standoj starigitaj de komercaj kooperativoj, kaj la kamparanoj povas aĉeti tie siajn bezonaĵojn post forvendo de siaj produktaĵoj.

De la 9-a ĝis la 11-a a.m. la foiro estis plej vigla kaj la

homplenaj stratoj fariĝis apenaŭ trapaseblaj. La standoj plenis je diversaj vendadoj kaj laŭte kriadis la eksponantoj por altiri al si klientojn — movplena bildo de gajaj homsvarmoj.

Ĉe vojkrucio mi renkontis kamaradon Pan, la estron de la Foira Administracio de la gubernio. Li estis helpanta maljunan kamparano konduki ĉevalĉaron tra la vojkrucio. Informiĝinte ke mi venis el malproksima Bejing, li varme min salutis. Mi demandis lin, kiam la foiro komencis funkcii. Li diris kun bedaŭro: “Ĝi malfermiĝis antaŭ nur unu jaro kaj la ordo ne estas tiel bona pro manko de sperto al la junaj administrantoj.”

Survoje al la strato, kie vendiĝas kortobirdoj kaj legomoj, Pan diris al mi, ke en la tuta gubernio sin trovas 19 foiroj kaj tiu de Zhaozhou estas relative granda. La ĉinaj kamparanoj havas sian longan tradicion de vizitado al foiroj. Sed pro la ĝenado de la ultra-maldekstra linio de Lin Biao kaj la “kvarpersona bando”, la komunumanoj estis malpermesitaj ekde 1968 entrepreni familiajn flankokupojn kaj vendi siajn proprajn produktaĵojn kun la argumento, ke tio “kondukas al kapitalisma vojo”. Sub direktado de tia politiko, malkreskis la kvanto de flankokupaj produktaĵoj, malmultiĝis la enspezoj de la kamparanoj kaj la urboj ne povis ricevi sufiĉe da tiaj bezonaĵoj.

Post la frakaso de la “kvarpersona bando”, la popola registaro restarigis racian ekonomian politikon por la kamparo, laŭ kiu komunumanoj povas entrepreni familiajn flankokupojn krom partopreno en kolektiva

produkta laboro kaj vendi produktaĵojn el sia terpeco por privata kultivado kaj flankokupajn produktaĵojn en foiro. Pere de la kamparaj foiroj, la kamparanoj povas interŝanĝe akiri siajn bezonaĵojn. La komerca kvanto de la kamparaj foiroj konsistigas nur ĉ. 10 procentojn de la totala kvanto de detalitaj komercaĵoj.

Alveninte al la strato, ni vidis, ke iuj estis aĉetantaj freŝajn brasikojn, verdajn spinaĵojn kaj dikajn tubaĵojn, aliaj havigis al si lotusradikojn kaj kolzojn. Estis vere bone, ke en la frosta vintro oni povis akiri de la foiro pli ol dek specojn de freŝaj legomoj. Tie oni povis elekti por si grasajn kokojn, anasojn, kuniklojn kaj ovojn. Ili estis vendataj laŭ interkonsentitaj prezoj. Ekzemple, 1 kilogramo da brasiko kostis 5 cendojn je detala vendo kaj 30 aŭ 35 kilogramoj 1 juanon je pogranda vendo: 1 kg. da tubaĵo kostis 8 cendojn, 1 kg. da lotusradikoj kostis 50 cendojn — ĉiuj tiuj prezoj estis pli malaltaj ol tiuj difinitaj de la ŝtato. La prezo de kokovoj egalas al tiu difinita de la ŝtato, nome 1 kg. kostis 2.2 juanojn. Tiu de porkaĵo estis 2.4 juanojn por 1 kg., iom pli alta ol la ŝtata prezo 2.08 juanoj por 1 kg.

Pan diris al mi, ke la nombro de la specoj de komercaĵoj jam kreskis de 94 en la komenca periodo ĝis pli ol 170. Pro abundeco de komercaĵoj, la prezoj jam iom post iom stabiligis. Laŭ statistiko, la prezoj de 42 specoj de komercaĵoj inkluzive de kokovoj kaj amelaĵoj vermiĉeloj proksimiĝis al tiuj difinitaj de la ŝtato, kaj tiuj de pomoj, piroj, porkidoj kaj aliaj 20 specoj de komercaĵoj estas eĉ iom malpli altaj ol tiuj difinitaj de

la ŝtato. La prezoj de grenoj, manĝoleoj, ovojn, viandojn kaj legomojn ĝenerale malaltiĝis je 40 ĝis 60 procentoj, kompare kun tiuj en oktobro de 1978, kiam restariĝis la foiro.

El la vigla komerco pri matoj el fragmitoj kaj sorgotigoj, mi vidis ke la kampara foiro estas oportuna por la vivo de la popolo. Vendinte siajn agrikulturajn produktaĵojn, multaj kamparanoj aĉetis matojn de la foiro por konstrui domon en la vintraj liberaj tagoj. En la pasinteco, la popolaj komunumoj malpermesis al la membroj plekti matojn, sed nun la registaro kuraĝigas la kamparanojn fari kaj permesas al ili vendi siajn produktaĵojn en foiro. En 1979, Zhaoxian-gubernio akiris riĉan rikolton, la kamparanoj havis pli multan enspezon kaj pli multaj el ili volas konstrui por si novajn domojn. En la foiro pli ol 40,000 matoj estis venditaj.

En la foiro grandkvante vendiĝis ankaŭ legomsemo, kokidoj, kuniklidoj, porkidoj, lignaj kaj bambuaj objektoj kaj agrikulturaj instrumentoj bezonataj de la komunumanoj por disvolvi produktadon.

La Eksporta Kompanio de Zhaoxian, kiu troviĝas ĉe la foirejo, starigis novan aĉetejon aldone al la antaŭa. Ĝiaj ofiĉistoj laboregis tuttage por ekzameni kaj aĉeti herbajn plektaĵojn alportitajn de kamparanoj. Oni diris al mi, ke multaj el la diversaj mansakoj kaj aŭtomobilaj kusenoj eksportitaj al Japanio, Hongkongo kaj sudorienta Azio estis faritaj de knabinoj en vilaĝoj de Zhaoxian-gubernio.

Ĉe la strato, kie vendiĝas grenoj kaj furaĝoj, mi vidis ke

du junaj administrantoj de la foiro faras pesadon kaj registradon. Post interkonsento de la vendantoj kaj aĉetantoj pri la prezoj de grenoj aŭ furaĝoj, la administrantoj povis pesi kaj registri la komercaĵojn por ili, kaj la lastaj devis pagi nur 0.4 juanon por 100 kg. La administrantoj laboris tiel juste kaj varmkore, ke ĉiuj en la komerco estis kontentaj pri ilia servo.

Kamarado Pan diris al mi, ke en foiraj tagoj la administracio alsendas ankaŭ propagandan aŭton por klarigi al la kamparanoj la politikon pri kamparaj foiroj. Li sciigis al mi, ke en tia foiro troviĝas ankaŭ spekulantoj, kvankam malmultaj, ekzemple ili povas aĉeti ion je malalta prezo en unu foiro kaj ĝin vendi je alta prezo en alia foiro, kaj eĉ enmiksi falsajon al

komercaĵo ktp. por akiri profiton. Se la foira administracio trovas tian aktivadon, ĝi kritikas aŭ punas la spekulanton laŭ lia kulpo por garanti ke la foiro iru en bona ordo.

Iom post la 14-a horo, finiĝis la foiro. La popolamasoj ĝoje reiris al sia hejmo kun aĉetitaj objektoj kaj mi devis fini mian interesplenan observadon.



XIAOYUN: (A decorative horizontal line consisting of a series of small circular icons.)

Pri fondo de entreprenoj per ĉina kaj alilanda kuna investo

—Intervjuo al Jing Shuping, direktoro de la Ĉina Internacia Konfida kaj Investa Korporacio

Lastatempe eksterlandaj legantoj skribis al ni, ke ni pritraktu la demandon pri fondo de entreprenoj per ĉina kaj alilanda kuna investo. Pro tio nia raportisto intervjuis respondeculon de la Ĉina Internacia Konfida kaj Investa Korporacio kaj faris la raportojn, kiun ni aperigas ĉi-sube.

La Red.

Antaŭ nelonge mi vizitis Jing Shuping, direktoron de la Ĉina Internacia Konfida kaj Investa Korporacio, kiu ĵus revenis de Japanio de esplorado, por informiĝi pri fondo de entreprenoj per ĉina kaj alilanda kuna investo.

Antaŭ ĉio li preparolis la favorajn faktorojn de fondo de tiaj entreprenoj. Li diris, ke dum la lastaj tri jaroj la ĉina politika situacio pli kaj pli stabiligis kaj la nacia ekonomio detruita de la kvarpersona bando komencis restariĝi kaj disvol-

viĝi. La prestiĝo de la ĉina ekstera komerco leviĝas, la internacia mona merkato havas superfluan neuzatan kapitalon kaj multaj landoj esperas, ke Ĉinio potenciĝos — ĉio tio favorigas al Ĉinio fondon de tiaj entreprenoj laŭ ĝia elekto.

Mi demandis: Ĉinio estas socialisma lando, kial ĝi volas enkonduki eksterlandan kapitalon? Direktoro Jing diris, ke akcepti eksterlandan investon kaj fondi entreprenon kune administratan estas ofte uzata formo en la internacia ekonomia kunlaboro. Ne mankas precedencoj, ke socialisma lando sukcese disvolvis sian ekonomion

ĉefe per siaj propraj fortoj kaj samtempe per importado de eksterlandaj avangardaj teknikoj kaj ekipaĵoj kaj sperto de administrado. Post la venko de la Oktobra Revolucio de Sovetunio, Lenin proponis luigi al fremdlandaj entreprenistoj tiujn olekampojn, minejojn kaj virgan teron, kiujn Sovetunio ne havis forton por ekspluati. En printempo de 1922 estis 17 tiaj entreprenoj en Sovetunio. En la lastaj jaroj Jugoslavio kaj Rumanio publikigis dekreton pri investado de fremdaj landoj en iliaj landoj kaj fondis nombro da kune administrataj kompanioj. Ĉinio respektive kun Pollando kaj Tanzanio fondis kune administratajn oceantrafikajn kompaniojn, kiuj ludis aktivan rolon por la nacia ekonomio kaj oceanrafiko de ambaŭ flankoj. Tial laŭlekte akcepti eksteran investadon surbaze de sendependeco kaj memstareco kaj sinapogo sur propraj fortoj estas efika rimedo por akceli la disvolviĝon de la nacia ekonomio.

Direktoro Jing daŭrigis, ke same kiel la brila kulturo en la mondo la avangardaj sciencoj kaj teknikoj kreiĝis de la popolo kaj estas komuna riĉaĵo de la tuta homaro. Ĉiuj landoj, inkluzive de la alte disvolvitaj landoj, povas trovi alies superaĵojn lernindajn por ili. Ili povas senĉese progresi nur kiam ili faras ekonomian interŝanĝon kaj lernas unu de alia.

La kune administrata entreprenado estas interhelpa ekonomia organizo en speciala formo. Laŭ la konkretaj kondiĉoj de Ĉinio, ĝi estas entreprenado fondita de investantoj de du aŭ pli ol du landoj, kiuj kune dividas profitojn kaj malprofitojn. Bona aŭ malbona administrado de la


entrepreno rekte influas la interesojn de la investantoj.

Parolante pri la pozicio de eksteraj investantoj en Ĉinio kaj iliaj leĝaj rajtoj en kune administrataj entreprenoj, direktoro Jing diris, ke iuj niaj amikoj estas maltrankvilaj pri nia suvereneco en tiaj entreprenoj, sed ilia maltrankvilo estas superflua, ĉar fundamentaj principoj devas esti observataj kiam oni akceptas eksterlandan investadon kaj fondas kune administratan entreprenon. Tia entreprenado estas submetita al la ĉina leĝo, kaj ĝia labora plano devas esti raportita al la koncerna departemento de Ĉinio por esti registrita en arkivo kaj estos plenumata en formo de ekonomia kontrakto. Ĉefdirektoro de la entreprenado devas esti ĉino, kaj la teknikoj kaj ekipaĵoj de niaj fremdlandaj kunlaborantoj devas esti avangardaj kaj bezonataj de Ĉinio. Se ili faras trompon kaj kaŭzas damaĝon al la entreprenado, ili devas kompensi nian perdon. Ni insistas, ke la gravaj problemoj estu solvitaj en interkonsiliĝo de ambaŭ flankoj. Kaj tio donas garantion al ambaŭ flankoj. Se du landoj kun malsamaj socisistemoj faras kunan administradon, ili devas observi la principon de egaleco kaj reciproka utilo. Kompreneble eksterlandaj kapitalistoj volas profiti en investado en Ĉinio, kaj por Ĉinio estas necese iom elspezi por kiel eble plej rapide efektivigi la kvar modernigojn. Fondo de tia entreprenado estas utila por ambaŭ flankoj.

Iuj el niaj eksterlandaj legantoj demandis, ĉu fondo de tia entreprenado signifas, ke Ĉinio forlasis la principon sin apogi sur propraj fortoj. La respondo de la direktoro estis nea. Li diris,

ke Ĉinio estas disvolviĝanta socialisma lando, kiu akumulas fonduson ĉefe per disvolvado de la socialisma ekonomio elvolvante la forton kaj saĝon de sia popolo kaj utiligante siajn proprajn riĉfontojn, kaj sin konstruas kaj ekipas ĉefe per siaj fortoj. Tamen tio ne signifas, ke Ĉinio malakceptos eksteran helpon. Tia helpo povas levi nian produktan forton kaj utili al disvolvado de ekonomio per nia propra forto. Ekzemple, havante la kune administratan entreprenon, ni povas utiligi la antaŭan internacian merkaton de eksterlanda kapitalo por aktive disvolvi nian eksteran komercon por akiri pli multe da fremda valuto kaj krome ni ankaŭ povas liveri pli da produktaĵoj por nia enlanda merkato. Kaj plie, nia lando havas abundajn subterajn riĉfontojn ankoraŭ ne ekspluatitajn. Se ni elprenos niajn riĉaĵojn sub la helpo de eksterlanda kapitalo, ni povos pli bone disvolvi nian ekonomion. Kaj la potenciĝo de nia ekonomia forto helpos stabiligi la internacia situacion. Ĝuste kiel japana politikisto diris, la efektivigo de la kvar modernigoj de Ĉinio kontribuos por la paco de Azio kaj la mondo.

Fine direktoro Jing diris, ke la ellaborado kaj publikigo de la leĝo pri fondo de entreprenoj per ĉina kaj alilanda kuna investo metis leĝan fundamenton por establi en Ĉinio tian specialforman ekonomian organizon. Nun la Ĉina Internacia Konfida kaj Investa Korporacio unuflanke perfektigas sian organizon kaj aliflanke komencis, laŭ la leĝo de investado, interparoli pri fondo de tiaj entreprenoj kun fremdlandaj kapitalistoj, samlandanoj en Xianggang (Hongkong) kaj Aomen (Aŭmen) kaj transmaraj ĉinoj.



Yandang-montoj

de RUI XUE

YANDANG-MONTOJ estas unu el la turismaj lokoj en sudorienta Zhejiang (Ĝeĝiang)-provinco. Ili dividiĝis en tri grupojn de la norda Yandang, meza Yandang kaj suda Yandang, kun granda distanco inter si. Inter ili la plej fama estas la norda Yandang, kiun oni ofte mencias per la nomo de Yandang-monto. Laŭdire, ĉe la supro de la montoj pasinte kuŝis lagoj kun densaj fragmitoj kaj tie ripozis sovaĝaj anseraroj ĉiujare en la interŝanĝo de aŭtuno kaj vintro, kiuj flugis suden el Siberio, tiel ĝi portis la suprediritan nomon. (En la ĉina lingvo Yan signifas sovaĝan anseron kaj Dang lagon.)

La pitoreskejo kun la areo de 450 kvadrataj kilometroj havas



102 montpintojn, 18 akvofalojn, 8 pontojn, 2 lagojn kaj aliajn ĉ. 200 vidindejojn, inter ili la ĉefaj vidindejoj estas Lingfeng, Lingyan kaj la akvofalo Granda Drako.

Unue ni venis al Lingfeng. Ĉirkaŭ ĝi troviĝas aliaj montpintoj kaj staras groteskaj rokoj. Norde de ĝi sidas la kaverno Beidou, sude de ĝi la kaverno Avalokitesvaro kaj meze de ĝi la hotelo Lingfeng. Ambaŭflanke de la hotelo lirlas klara roĵo, kiu enfluas en Ningbi-lagon.

La kaverno Avalokitesvaro troviĝas inter du montpintoj. Interne de ĝi staras naŭetaĝa pavilono, konstruita en la dinastio Jin (265-420 p.K.). Ni haltis en la sepa etaĝo kaj trovis, ke la gutoj falintaj desupre formiĝis en akvoperlan kurtenon balanciĝantan en vento, jen falante sur niajn kapojn, jen sur la ŝultrojn. Rigardante eksteren tra la kurteno, ni rimarkis, ke sur la rokmuĵo aperas bela virino en antikvaj vestoj. Ĝi vere similas al Avalokitesvaro formita en natura roko. Kiam ni ascendis ĝian plej altan etaĝon, malvarma aero frapis nian vizaĝon kaj ni kvazaŭ eniris "malvarman mondon". Rigardante supren, ni vidis la du montpintojn proksimiĝintajn kaj strion da ĉielo inter la du montkrutaĵoj.

Ni malsupreniris laŭ la ŝton-ŝtuparo kaj revenis al la kvina etaĝo. Ĉe la pordo de la etaĝo du maljunuloj metis kelkajn tablojn kaj seĝojn kaj vendis *lingĝi*-on (*Ganoderma lucidum*), *ŝihu*-on (*Dendrobium nobile*) kaj aliajn drogojn. Ni sidiĝis por paŭzi. La gastamaj maljunuloj kunportis glasojn da teo. Trinkante kune kun ni, la maljunuloj parolis pri Yandang-montoj.

Laŭ ilia diro, Yandang-montoj havas ne nur belajn pitoreskejojn, sed ankaŭ multajn montajn produktaĵojn. Kiel kvin raraĵoj en Yandang-montoj, famiĝas la teo Yanming, eperlano, *ŝihu*-o, piro kaj belsona birdo. De longe ni scias, ke tiuspeca piro estas

plej delikata kaj dolĉa. Eperlano surhavas malgrandajn skvamojn, kies viando estas tre bongusta kaj post bako ĝi fariĝis orkolora kaj portebla. Sed ni tute ne vidis la belsonan birdon. La maljunuloj diris al ni, ke tiuspeca birdo aspektas kiel kanario kaj ŝatas grupan vivon. Oni kvazaŭ ĝuas flutmuzikon, kiam la birdo kantas. Tial oni donis al ĝi la suprediritan nomon. Tiuspeca birdo, kiel rara birdo, estas netrovebla en aliaj lokoj.

Post la vespermanĝo ni promenadis ĉe Ningbi-lago. Ĝi situas ĉe la piedo de Lingfeng-montpinto kaj estas tre ĉarma: Sur la lago ondoj puŝiĝas unuj post aliaj kaj la lago estas klara

kiel spegulo. Tie la montpintoj leviĝas vertikale ĝis la ĉielo. Iliaj formoj estas tre variaj. Tial oni donis al ili diversajn interesajn nomojn. En la luna lumo la montpinto Kunpremitaj Manplatoj aspektas kiel junaj geedzoj premitaj unu al la alia; la montpinto "Ora Koko Koke-rikas Matenon" — petolema paŝtobubo; kaj la montpinto Bambuĝerma Paro — maljunulino kun arĝentaj haroj. Ĉi tie cirku- las jena humora popolkanto:


*Jam dormas rinocero sub
silenta montopinto,*

*ekkveras jen geedzoj sub la
lun-lumfonto.*

*Dum tion kaŝrigardas petole-
ma paŝtobubo,*

*forturnas sian kapon la avin'
pro honto.*


Akvofalo Malgranda Drako




Ekirante de Lingfeng, ni trairis serpentuman ombran vojeton de 5 kilometroj kaj atingis Lingyan. Tie estas densaj arbaroj kaj profundaj antikvaj kavernoj. Laŭ zigzaga vojeto ni surgrimpis du antikvajn kavernojn Tianchuang kaj Longbi.

Interne de Tianchuang-kaverno troviĝas aliaj kavernoj. La kavernoj estas groteskaj kaj la vojoj krutaj. Trapasinte unuspire 7-8 ŝtonŝtupojn krutajn je ĉ. 80 gradoj, ni fine surgrimpis Tianchuang-kavernon. Ekster ĝi surrokaj pinoj balanciĝis en zefiro.

Estis tagmeze, kiam ni surgrimpis Longbi-kavernon. Ni tre soifis. En tiu tempo iu el ni rakontis historieton "La akvo gutas el la draknazo". Onidire, en Longbi-kaverno antaŭe vivis bonaŭgura drako, el kies nazo elfluis akvo tre klara. Tie pre-



La Pordo inter Ĉielskrapantoj



Montpinto Peniko

nis akvon la ĉirkaŭaj loĝantoj. La akvo povis kuraci okulmal-sanon. Maljuna bonzo intencis monopoli la fonton kaj foje refoje tikladis al ĝi la nazon, kaj la lasta indigniĝis kaj ĉesigis la fluon. Ni ĉirkaŭrigardis kaj trovis, ke sur la rokmuro serpentumas spuro kvazaŭ moviĝanta drako, kies ungoj kaj nazo videbliĝas.

Yandang-montoj havas ne nur groteskajn montpintojn, rokojn kaj profundajn kavernojn, sed ankaŭ fontojn kaj akvofalojn ĉie. La plej fama akvofalo Granda Drako troviĝas en la sudokcidenta parto de Yandang-montoj. Ĝi estas 10 kilometrojn for de Lingyan.

La akvofalo Granda Drako estas alta ĉ. 190 metrojn. La akvo fluge falas kiel blanka rubando ŝvebanta apud densa arbaro. La akvo falas kiel pluvo, ŝvebas kiel strioj da blan-

ka nubo kaj leviĝas kiel fumo en vento. En la akveroj sub la sunlumo prezentiĝas diversaj koloroj kaj ĝi estas aparte rava, kiel parado kaj ĉielarko. Montanoj diris, ke post pluvo la akvofalo la Granda Drako ŝajnas arĝenta rivero kun altaj ondoj kaj tondrobruo. Estas senkaŭze, ke la antikvaj kaj nuntempaj poetoj kaj verkistoj laŭdis ĝin mirakla pejzaĝo en la mondo.

En tiuj tagoj, kiam ni restis en Yandang-montoj, ni vizitis ankaŭ historiajn restaĵojn. De antikveco oni jam nomas ĝin Sanktejo de Budhismo. Laŭ la noto de historio, frue en la periodo Yonhe (345-356) de Jindinastio, la eminenta bonzo Noĝina de Sichuan-provinco venis kun 300 disĉiploj al Yandang-montoj kaj tie konstruigis pago-dojn kaj templojn. Poste li atingis nirvanon rigardante la akvofalon. Dekomence de la

dinastioj Tang (618-907) kaj Song (960-1279), Yandang-montoj pli kaj pli famiĝis. Precipe post kiam la kortego de Song-dinastio translokiĝis suden kaj prenis Lin-an (la nuna Hangzhou) kiel sian ĉefurbon, vizitantoj alvenis unuj post aliaj kaj multaj famaj bonzoj tie predikis sutrojn.

Gvidisto diris al ni, ke sur Yandang-montoj estis konstruitaj unu post alia 18 temploj, inter kiuj la plej granda estas Nengren-templo. Ĝi estis konstruita en la jaro 999 p.K. Tiu konstruaĵo estas pompa kaj delikata strukture. Tiutempe vizitantoj estis tre multaj, ĉiutage pli ol 1,000. Nuntempe apud ĝi ankoraŭ kuŝas giganta kaldrono kun alteco de 1.5 metroj kaj pezo de pli ol 130 tunoj. Ni ĉirkaŭrigardis la fanditajn sur ĝi ideografiaĵojn. Sed kelkaj junuloj simple grimpis en ĝin kaj dancis.


Eminenta Altosalta Trejnisto Huang Jian

POST la Oka Azia Sportkunveno okazinta en la ĉefurbo de Tajlando Bankoko de decembro de 1978, iu raportisto de "Atletika Revuo" de la Okcidenta Germanio skribis: "Huang-Jian estas mia plej adorata altosalta trejnisto en la mondo. Inter liaj elstaraj trejnitoj troviĝis Zheng Fengrong, kiu rompis la mondan virinan rekordon per tondila salto, kaj Ni Zhiqin, kiu rompis la mondan viran rekordon per disstara salto. Kaj nun li trejnas Zheng Dazhen, kiu strebas al nova alto je surdorsa salto. Tio montras, ke Huang Jian estas tre sperta pri altosalta studo kaj posedas principojn de tiu sporto."

Huang Jian havas nun 52 jarojn. En sia knabeco kaj juneco li lernis en Sovetunio. Vintre de 1940 kamarado Zhou Enlai kaj lia edzino Deng Yingchao iris al la Ŝtata Infanĝardeno en Moskvo por vidi tie kelkdek ĉinajn geknabojn. Kiam li demandis Huang Jian, kio li volas fariĝi plenkreskinte, la lasta ne sciis kiel respondi kaj ruĝiĝis.

"Li ŝatas sporton kaj estas nia sportisto," diris iu knabo apude.

Kamarado Zhou Enlai laŭdis: "Estas tre bone, ke vi ŝatas sporton. Ankaŭ sportoj estas bezonataj por sukceso de la revolucio!"



Huang Jian

De tiam Huang Jian decidis sin okupi pri sportado, rigardante ĝin kiel bezonon de la revolucio.

I

En la fino de 1951, la 24-jara Huang Jian revenis al la patrolando kaj ekfunkciis kiel trejnisto de la ŝtata atletika teamo.

Li estis altirita de iu 15-16-jara knabino de Shandong (Ŝandong)-provinca teamo, kiam li rigardis altosaltan konkurson de la knabina grupo en la Tutlanda Sportkunveno de Gimnastiko, Biciklado kaj Atletiko en 1953. Li serioze petis respondeculon de la trejna teamo: "Lasu la knabinecon ĉe mi, ke mi trejnu ŝin. Ŝi estas esperebla atingi la mondan nivelon." Ŝi estis neniu alia ol Zheng Fengrong, kiu rompis la mondan rekordon

per transsalto de alto de 1.77 metroj post tri jaroj en 1957.

Tiam tri manieroj tondila, rula kaj disstara estis aplikataj en altosalto. La lasta estis relative nova, kaj multaj altosaltoistoj klopodis por ĝin lerni. Laŭ la korpaj kondiĉoj de Zheng Fengrong, Huang Jian decidis, ke ŝi sin ekzercu en tondila maniero. En 1957, kiam la Ĉina Atletika Teamo vizitis Sovetunion, iu sovetunia altosalta trejnisto diris al Huang Jian: "Kial ŝi ekzercu sin ankorau en tiu maniero! Ĉu vi ne legis mian libron? Se ŝi ne konvertiĝos al disstara maniero, ŝi neniam rompos la mondan rekordon." Pri tio Huang Jian meditis plurajn tagojn, tamen li insiste trejnis Zheng Fengrong per tondila altosalto.

Ĉiutage li elspezis multan tempon por trejni Zheng Fengrong. Jam mallumiĝis kaj ne videblis la lato, Huang Jian alligis do al la lato blankan naztukon, por ke Zheng Fengrong daŭrigu la saltadon. Eĉ en pluva tago li postulis, ke ŝi persistu en la ekzercado. Foje Zheng Fengrong eklarmis pro malfacilo, tiam li ŝin kuraĝigis. Forviŝinte la larmojn, ŝi denove kuris al la lato. Poste en sportkunveno okazinta en Beijing (Pekino) ŝi transsaltis alton de 1.77 metroj kaj per tio rompis la mondan rekordon de 1.76 metroj posedatan tiam de la usona altosaltoistino James McDaniel.

II

En la Tutlanda Geknaba Sportkunveno okazinta en 1959 Huang Jian informiĝis, ke iu knabo de la Fujian (Fugian)-provinca atletika teamo lerte saltas, kaj kun granda intereso

iris rigardi. La knabo nomiĝas Ni Zhiqin, kiu, tiam 17-jara, havis altecon de 1.84 metroj kaj estis tre malgrasa kun iom kurbiĝinta dorso. Tamen lia miriga elasteco en salto profunde impresis Huang Jian. Huang demandis lin pri lia historio de altosalto, observis lian malgrasan korpon kaj afable demandis:

“Malgranda Ni, ĉu vi suferas ian malsanon?”

“Jes,” diris Ni Zhiqin, “ofte doloras min la stomako, miopas la okuloj, kaj kuracisto diris, ke mia sangopremo ne stabilas, kaj krome min atakas neŭras-tenio...”


Malgraŭ tio Huang Jian proponis restigi ĉe si Ni Zhiqin.

En 1963 Ni Zhiqin transsaltis alton de 2.20 metroj en Beijing. Tamen posttagmeze de la 13-a de novembro de la sama jaro li transsaltis alton nur de 2.01 metroj en la Unua Sportkunveno de la Nove Leviĝantaj Landoj okazinta en Ĝakarto, kaj tio multe deprimis liajn kamaradojn.

La malsukceso forte skuis Ni Zhiqin kaj lian trejniston Huang Jian. Nokte la lasta longe ne povis endormiĝi. Ĝuste kiam ili dronis en ĉagreno, la estro de la ĉina delegacio kamarado He Long vokis ilin al si kaj donis al ili kuraĝigajn vortojn, ke ili ne vanigu la esperon de la patrolando.

Ja grandan energion Huang Jian elverŝis por kulturi Ni Zhiqin.

En 1966 en la Sportkunveno de la Aziaj Nove Leviĝantaj Landoj okazinta en Pnompeno, Ni Zhiqin transsaltis alton de 2.27 metroj, nur je unu centimetro sub la tiama monda rekordo.



Huang Jian instruas sur sporta placo

Post kvar jaroj, en la 8-a de novembro, 1970, la 28-jara Ni Zhiqin fine transsaltis alton de 2.29 metroj en la Tutlanda Atletika Konkurso okazinta en Changsha (Ĉangŝa) de Hunan-provinco, kaj per tio li rompis la mondan rekordon de 2.28 metroj posedatan de la sovetunia altosalto Valeri Brumel en 7 jaroj.

III

Huang Jian aĝas jam pli ol 50 jarojn, tamen li laboras ankoraŭ kun plena memfido.

En la dua duonjaro de 1977 Fujian-provinco sendis al li

belan altosaltoistino Zheng Dazhen kun alteco de 1.75 metroj. Huang Jian demandis ŝin: “Malgranda Zheng, kian alton vi planas transsalti en la kurlanda jaro?” “1.82-metran, kaj mi klopodos por rompi la landan rekordon per 1.84 metroj.” Huang Jian diris kapskue: “Mi interesiĝas ne pri rompo de la landa rekordo, sed pri la alto de 1.88 metroj, eĉ de 1.90.” Liaj vortoj forte mirigis malgrandan Zheng.

Antaŭvespere de la selekta konkurso por la Oka Azia Sportkunveno de 1978, Zheng Dazhen transsaltis alton de 1.82 metroj en la loka konkurso kaj

gajnis la unuan lokon. Kia laŭdinda sukceso! Tamen Huang-Jian, kvazaŭ ne informiĝinte pri tio, postulis, kiel kutime, ke ŝi multe sin ekzercu. Malgranda Zheng iom malĝojis kaj dum la ekzercado ŝi kuris ne plenergie. Sen alta rapideco de svingodona alkuro, kiel ŝi povus tre alten salti? Vidintion, Huang ekkoleris kaj diris mansvinge: "Vi foriru!"

Foriri?! Per la larĝe malfermitaj okuloj malgranda Zheng mire rigardis la trejniston, antaŭsentis malagrablaĵon kaj foriris kun pezaj paŝoj.

Trejnante aliajn sportistojn, Huang Jian pensis, ĉu malgranda Zheng povas elporti tian riproĉon? Li kun iom da maltrankvilo ĵetis rigardon ekster la sportejon kaj trovis, ke malgranda Zheng staris sub arbo kaj rigardis ekzercadon de aliaj sportistoj. Kaj tiam Huang Jian trankviliĝis. Li faris riproĉon kun la intenco doni iom da premio al malgranda Zheng, por ke ŝi mem funkciigu sian cerbon, ĉar li sciis el sia sperto de multjara trejnado, ke se trejnisto ne severe postulas sian trejnaton, la lasta neniam transsaltos idealan alton...

Inaŭguriĝis la Oka Azia Sportkunveno. Zheng Dazhen vere ne vanigis la esperon de la patrolando kaj la popolo, nek tiun de trejnisto Huang. En Bankoko, malgraŭ neadaptiĝo al la tiea klimato kaj nekonateco de la tereno, ŝi kuris al la lato unu fojon post alia. Kiam la lato leviĝis ĝis alto de 1.84 metroj, ŝia lasta rivalo, sperta japana altosaltistino Tamami Yagi, malsukcesis. Zheng Dazhen transsaltis alton de 1.88 metroj kaj gajnis la oran medalon de tiu konkurso.

Verku por EPĈ

Por ke "El Popola Ĉinio" fariĝu legaĵo ŝatata de legantoj, ni sincere esperas, ke diverslandaj legantoj verkos por ĝi:

(1) Artikolojn kaj informojn pri la Esperanta Movado en diversaj landoj, inkluzive de uzado kaj disvastigado de Esperanto en scienco, kulturo, eduko, eldono, disaŭdigo, trafiko, poŝto- kaj tele-komuniko, turismo k.a., kaj pri amika komunikiĝo inter diverslandaj esperantistoj;

(2) Informojn pri eldono de esperantaj libroj kaj revuoj aŭ recenzoj pri ili;

(3) Artikolojn pri interlingvistiko kaj esperantologio;


(4) Artikolojn pri L. L. Zamenhof kaj diverslandaj famaj esperantistoj, esperantistaj literaturistoj, artistoj kaj sciencistoj;

(5) Eseojn pri diverslandaj moroj, kutimoj, pitoreskejoj, historiaj vizitindejoj, mirindaĵoj k.a. kun nacia aŭ loka gusto;

Kaj ke ili kontribuos al ĝi legindajn literaturajn verkojn originalajn aŭ tradukitajn en Esperanto kaj fotojn faritajn de esperantistoj pri naturaj belaĵoj.

Krome, en majo de 1980 estos la 30-a datreveno de la fondiĝo de nia gazeto "El Popola Ĉinio", por ĝin celebri ni eldonos specialan numeron kaj ni ĝoje kaj danke akceptos artikolojn de novaj kaj malnovaj legantoj kaj amikoj pri nia gazeto.

Artikoloj en ĉiaj stiloj estos akcepteblaj. Post aperigo de la artikoloj en EPĈ, ni sendos al la verkintoj malgrandajn donacaĵojn.





Saĝa edzino

ANTAŬ longe vivis iu sinjoro ĵaran-o*, kiu kun sia potenco agis tirane kaj faris ĉiajn malbonojn. La popolo lin malamegis.

Iun tagon, irante al la reĝa palaco li vidis survoje, ke la honesta Bat paŝtas ŝafojn. De longe li jam volis posedi la edzinon de Bat, tial li turnis sian ĉevalon al li kaj demandis: “Bat, kiom da ŝafoj vi paŝtas?”

“Ĝuste 330, estimata sinjoro,” respondis Bat, pensante en si, kian novan artifikon la aĉulo faros.

“Vi eraris,” diris la sinjoro, turnante siajn triangulajn okulojn. “Mi aŭdis de via mastro, ke estas 334 en la greĝo.”

“Erari mi ne povas,” diris Bat. “Tutjare mi kunestas kun la ŝafaro. Mi scias eĉ, kian signon havas ĉiu ŝafo, por ne paroli pri la nombro.”

Saĝa edzino

(ĈINA POPOLRAKONTO)

“Nu, bone,” ridaĉis la sinjoro. “Diru, Bat, kiom da haroj havas tiu makulhara ŝafo?”

“Mi — mi neniam kalkulis,” ektimis Bat kaj balbutis.

“Vi ja diris, ke vi eĉ scias, kian signon havas ĉiu ŝafo,” la sinjoro diris ĝoje kaj tuj severiĝis lia mieno, “Bat, vi devas elkalkuli ĝiajn harojn, antaŭ ol mi revenos morgaŭ. Alie via bela edzino estos forkondukita.”

Jen vere okazis kio estis atendita. Bat bone sciis, ke la postulo de la sinjoro estas maljusta, sed kion li povis fari?

Vespere Bat enstalis la ŝafaron kaj revenis hejmen. Anstataŭ vespermanĝi li tuj enlitiĝis malĝoje, kaj tio forte maltrankviligis lian edzinon. Ŝi alproksimiĝis kaj lin demandis: “Ĉu vi malsaniĝis?”

“Ne.”

“Ĉu la mastro vin batis?”

Bat kapneis.

“Kio do okazis al vi?”

Bat faris longan elspiron kaj rakontis al ŝi ĉion. Tiam ŝi ekridegis: “Kial malĝoji! Prenu manĝon kaj bone ripozu poste. Kiam vi iros paŝti morgaŭ, mi diros al vi, kiom da haroj havas la makulhara ŝafo.”

La sekvantan tagon lia edzino diris al li: “Kiam la sinjoro vin demandas, diru al li, ke la ma-

kulhara ŝafo havas ĝuste tiom da haroj, kiom lia ĉevalo, nek pli nek malpli. Se li ne kredos, do li mem kalkulu.” Tion aŭdinte, Bat ĝoje ĉirkaŭprenis ŝian kolon per ambaŭ brakoj, ŝin kisadis kaj poste foriris kun ĝojo por paŝti.

Tiutage vere venis la sinjoro. Kiam li demandis Bat, la lasta respondis, kiel lia edzino diris. La sinjoro tute ne atendis tian respondon kaj mutis por momento. Sed poste li oblikve okulpafis lin kaj diris minace: “Bat, ĉu vi scias, kian punon oni meritas, se oni trompas ĵaran-on? Mi estas certa, ke tiuj vortoj, kiujn vi diris, ne estas viaj propraj. Konfesu, kiu instruis tion al vi!”

La honesta Bat neniam mensogis, kaj li konfesis ĉion antaŭ la minaco de la sinjoro.

Aŭdinte lian konfeson, la sinjoro flamiĝis de kolero, faris teruran mienon, kvazaŭ li volus manĝi homon, kaj kriis: “Tiu virinaĉo! Ŝi eĉ aŭdacas ridindigi min! Tamen per duono de mia buŝo mi jam ŝin silentigos.” Post tiuj vortoj li sigelis duonon de sia buŝo per paperpeco kaj galopis sur ĉevalo al la hejmo de Bat.

La edzino de Bat estis en kudrado. Kiam ŝi vidis la sinjoron venantan, ŝi intence turnis sian dorson al la pordo kaj ne salutis lin. Tio vekis ankoraŭ pli gran-

dan koleron ĉe la sinjoro. “Kien iris via bopatrino?” li demandis kolere.

“Ĝi melkas bovinon ĉe la kuirforno,” respondis la edzino de Bat, ne levante la kapon kaj daŭre farante la kudradon.

“Kial ĝi melkas tie? Ĉu ĝi ne timas, ke la bovino eligos fekon en la kaldronon?”

“Ne,” diris la edzino de Bat per altigita voĉo, “mia bopatrino jam gluis paperpecon sur la anuson de la bovino.”

“Aĥ! Kio? . . .” longe la sinjoro ne povis trovi respondon. Li eksvingis sian manikon kaj forkuris deprimita.

(Redaktita de mongolo
Bao Sihai)

* *Jaran-o estis ŝtatoficisto en la mongola feŭda socio.*



“Ne, mia bopatrino jam gluis paperpecon sur la anuson de la bovino.”
Ilustrita de mongolo GANCHUG



IKSO:

Predo de Fiŝisto

*Konkulo sin sunumas ĉe rivera rand',
la konkon ovras kaj montriĝas la viand'.
Jen alŝteliĝas gru' kaj per subita sving'
alsaltas por la karnon ŝiri (frand'!) . . . Sed ping!
Fermiĝas fulme la konkklapoj kaj la bek'
jam enpinĉitas, ke la gru', eĉ per streĉeg'
de l' tuta fort' ne povas el la embaras'
sin tiri. Mokas la konkulo: “Damna ras',
malsate vi mortaĉos en mia katen'!”
Refutas gru' incita: “Zorgu pri vi mem!
Malŝvelas la river' kaj vanos via ramp' aŭ
barakto.” Dum obstinas la du en malced',
fiŝisto preterpasas kaj sen klopodet'
ekprenis ambaŭ.*

Laŭ fablo el la libro “Ĝan Guo Ce”*

* “Ĝan Guo Ce” estas kolekto de eseoj de politikaj aspirantoj de la Periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.)

Kiosko de Ebria Oldulo

de OUYANG XIU*

ĈIRKAŬ la urbo Chu staras multaj montoj, kaj la montoj sudokcidente de ĝi estas ĉarmaj pro siaj arbaroj kaj valoj. Inter tiuj montoj la plej dense kovrata kaj plaĉa estas la monto Langya. Irinte 6-7 li-ojn (unu lio = 0.5 km.) surmonite, oni aŭdas lirladon de akvo fluanta el inter montoj. Jen estas la fonto Niang**. Plu irante laŭ zigzaga vojeto, oni vidas kioskon kun kvar tegmentaj anguloj supren levitaj staranta super la fonto. Ĝi estas Kiosko de Ebria Oldulo. Kiu konstruigis la kioskon? Li estas bonzo Zhixian de la monta templo. Kaj kiu donis al ĝi la nomon? Tiu estas la prefekto de tiu loko. Li ofte venas, kun siaj amikoj, al la kiosko por tie drinki kune, sed baldaŭ li ebriiĝis, eĉ se li prenis malmulte. Kaj inter tiuj drinkuloj li estas la plej grandaĝa, tial li nomis sin Ebria Oldulo. Fakte, lin delektas ne drinkado, sed la bela pejzaĝo. La ĝojo en aprezo de pejzaĝo tuŝis lian koron kaj li montris sian raviĝon en drinkado.

Kiam la suno leviĝas, la matena nebulo malaperas sur la arbaro. Kiam la nuboj revenas, la vala vespera krepusko ĉion malklariĝas. Tiu ŝanĝo de la heleco kaj malsereniĝo es-

tas mateno kaj vespero en montoj. Sovaĝaj floroj ekaromas agrable, la arboj kreskas prospere kaj multe donas ombrojn, vento blovas alte kaj prujno glimbri-las, akvo malaltiĝas kaj ŝtono elmontriĝas en la fundo. Tio estas la kvar sezonoj en la montoj. Oni venas en mateno por ĝin rigardi kaj reiras en vespera krepusko. En malsamaj sezonoj varias la pejzaĝo, de tio la ekskursantoj ĉiam ricevas plezuron.

El la piedirantoj sur la monta vojo, iuj portas objekton kantante, aliaj ripozas sub arboj, vokante unu alian. Sur la vojeto iras ankaŭ gajaj maljunuloj kaj infanoj. Dum la ekskursado la prefekto regaliasiajn gastojn per viandriĉaj fiŝoj kaptitaj el rojo, bona vino farita el la akvo de la fonto Niang, ĉasaĵoj kaj vegetalpladoj. Al la festeno mankas muzikaĵo, sed ili amuzas sin per sagojetado*** kaj ŝakludo. La gajaj gastoj tostas de tempo al tempo, jen interŝanĝas nombrilojn, jen stariĝas, jen bruas. Inter tiuj drinkantoj sidas grizhara oldulo malvigle. Jen ebriiĝas la prefekto.

Baldaŭ subiras la suno kaj disiĝas la festenantoj. La prefekto revenas kaj la gastoj sekvas. La arbaroj fariĝas pli malhelaj kaj la

birdoj pepas ĉe ili, la ekskursantoj foriras kaj la birdoj estas en gajeco. Sed la birdoj konas nur sian ĝojon pro arbaro kaj montoj, sed ne ĝojon de la ekskursantoj. La gastoj ĝojas ke ili akompanas la prefekton en ekskurso, sed ne konas ke la prefekto trovas en tio sian ĝojon. Tiu, kiu, ebriiĝinte, povas ĝui la pejzaĝon kun la aliaj gastoj kaj, rekonsciiĝinte, povas noti la ekskurson, estas la prefekto. Kiu estas la prefekto? Li estas Ouyang Xiu de Luling.

* Ouyang Xiu (1007-1072 p.K.), literaturisto de la Norda Song-dinastio, fama precipe pro siaj prozoj. «Kiosko de Ebria Oldulo» estas unu el liaj eminentaj verkoj.

La kiosko situas sur la monto Langya en la sudokcidenta parto de la nuna gubernio Chu de Anhui-provinco. En 1046, Ouyang Xiu estis, pro sia kritiko al la kortego, malpromociita kaj sendita foren al Chu kiel ĝia prefekto.

La verko estis farita en la sekvanta jaro post lia enofiĝo kiel prefekto. Per delikataj kaj zigzagaj priskriboj li vivece prezentis la pejzaĝon ĉirkaŭ la kiosko kaj la aktivadon de ekskursantoj, esprimante sian morozecon kaj senesperecon post politika malvenko.

** En la ĉina lingvo Niang signifas fari vinon, do la fonto Niang signifas, ke la akvo de la fonto estas tre taŭga por fari vinon.

*** Sagojetado estis distrajo en la antikva Ĉinio. Dum festeno oni jetis sagojn en kruĉon en certa distanco. Gajnis la ludon tiu, kiu trafis.



Serio de poŝtmarkoj pri ĝing-aj vizaĝdesegnoj

KARAJ geamikoj, ĉu vi iam rigardis Pekinan operon de Ĉinio? Ĝi estas sinteza arto kun literaturo, muziko, danco, belarto kaj akrobataĵo en kombino. Ĝi jam havas historion de 150 jaroj.

Tiu speco de opero prenas kantadon, parolon, gestadon kaj akrobataĵojn kiel esprimajn rimedojn. La kantoj en la Pekina opero estas aranĝitaj laŭ fiksfarmaj melodioj taŭgaj por esprimi diversajn sentojn

kaj animstatojn de la roloj. La paroloj, ĉu dialogoj aŭ monologoj, estas plenumataj aŭ en speco de recitativo aŭ en dialekto de Beijing (Pekino). Por prezenti malsamajn karakterojn, pensojn kaj sentojn de la roloj,

Seng kaj ĉou



Ĝing



diversaj fiksfarmaj gestoj kaj pozoj estas uzataj en ludado. Tiuj gestoj kaj sintenoj, kiel ekzemple ordigo de barbo, ĝustigo de ĉapo, svingo de maniko kaj eklevo de gambo, estas komunaj scenejaj lingvaĵoj kompreneblaj por la aktoroj kaj spektatoroj. Per akrobataĵoj oni povas prezenti batalon ĉu kun armiloj aŭ sen armiloj, laŭ bezono de la intrigo, kaj per tio oni povas prezenti luktojn de diversaj stiloj.

La ludantoj de Pekina opero estas dividitaj en kvar specoj, nome *ŝeng*, *dan*, *ĝing* kaj *ĉoŭ*. La *ŝeng*-oj ludas virajn rolojn. Tiu, kiu ludas rolon de maljunulo kun barbo, nomiĝas *laŭŝeng*; tiu, kiu ludas rolon de junulo, nomiĝas *ŝjaŭŝeng*; tiu, kiu ludas rolon de viro lerta en batalado, nomiĝas *vuŝeng*. Inter la *dan*-oj, tiu, kiu ludas rolon de ĝentila kaj kvieta junulino aŭ mezaĝulino, nomiĝas *ĉingji*; tiu, kiu ludas rolon de juna virino aŭ knabino naiva, facilanima kaj pika, nomiĝas *huadan*; tiu, kiu ludas rolon de virino kun

batalarto, nomiĝas *vudan*; kaj tiu, kiu ludas rolon de maljunulino, nomiĝas *laŭdan*. La *ĝing*-oj ludas rolojn de malkaŝemaj, larĝmovaj viroj kun bunte ŝminkita vizaĝo. La *ĉoŭ*-oj kun blanka ŝminko sur la nazo iom similas al arlekenoj aŭ pajacoj. Ili ludas rolojn de spritaj bonkoruloj aŭ ruzaĵ, malicaj krue-luloj.

Aparte menciinda estas la ŝminkado de la *ĝing*-oj kaj *ĉoŭ*-oj, kies vizaĝoj estas ŝminkitaj per koloroj laŭ difinitaj desegnoj. Kaj la *dan*-oj povas ŝanĝisian vizaĝformon helpe de artefaritaj lamenformaj hararpecoj. Por muzika akompano, kordaj kaj perkutaj instrumentoj estas uzataj, kaj muzikisto de klakilo aŭ klaktambureto funkcias kiel direktanto de la muzikistoj en ludado. La kostumoj en la klasikaj operoj estas imitaĵoj de vestoj de Ming-dinastio (1368-1644 p.K.), kaj malsamaj vestaĵoj estas uzataj por montri malsamajn karakterojn. La glavoj, lancoj kaj halebardoj uzataj en scenoj de batalado estas beligitaj

imitaĵoj oportunaj por ludado, same kiel la aliaj rekvizitoj. Iuj rekvizitoj estas uzataj kiel simboloj, ekzemple rolulo kun vipo en mano signifas ke li havas ĉevalon, kaj se rolulo movas remilon, tio signifas ke li remas. Kaj iuj agoj, kiel ekzemple fermo aŭ malfermo de pordo, estas prezentataj nur per gestoj, tute sen uzo de rekvizito.

Post la fondo de la Popola Respubliko, la arto de Pekina opero ricevis senĉesan reformadon. Krom bonaj tradiciaj pecoj, oni ludas ankaŭ nove verkitajn historiajn Pekinajn operojn per la tradiciaj esprimaj rimedoj. Kaj oni ankaŭ kreis modernajn Pekinajn operojn, kiel "Ruĝa Lanterno" kaj "Ŝagia-bang", kaj en prezentado de tiaj teatraĵoj oni rompis la tradicion kadron de fiksaĵoj kaj enkondukis novajn en muzikon, kantadon kaj ludadon, tiuflanke la arto de Pekina opero ricevis disvolviĝon. Ekde tiu ĉi numero, nia gazeto provas konigi al vi la vizaĝdesegnojn de la roluloj kaj ilian ludadon.

Dan



Favorajn kondiĉojn profitu!

Abonu kaj abonigu!

En majo de 1980 venos la 30-a datreveno de la naskiĝo de "El Popola Ĉinio". Renkonte al tiu jubileo ni decidis havigi al la esp-istaro ŝancon aboni EPC-on je favoraj kondiĉoj dum la periodo de majo ĝis aŭgusto. Ĉiu, kiu sukcesos varbi abonantojn por ni, ricevos donacojn laŭmerite.

Dum la pasintaj 30 jaroj nia revuo ricevis varman subtenon de ĉiulandaj esperantistoj. Inter ili troviĝas niaj konstantaj abonantoj, abonigantoj kaj perantoj. Ni kore dankas ilin ĉiujn pro subteno al nia laboro. Ni sincere esperas, ke ĉiuj niaj esperantistoj-amikoj vaste diskonigos nian nunan varban kampanjon kaj aktive varbos al ni novajn abonantojn.

Ĉiu, kiu abonos la revuon en tiu ĉi periodo, senpage ricevos speciale faritan insignon "EPC-amiko" kaj ekzempleron de la kolora bild-kolekto "El Novaj Ĉinstilaj Pentraĵoj". Ni donace sendos ankaŭ aliajn memorarojn al la perantoj kaj abonigantoj, kiuj varbos al ni novajn abonantojn.

Abonu ĉe: peranto de El Popola Ĉinio en via lando

Universala Esperanto-Asocio
Esperanta Sekcio de GUOZI
SHUDIAN, P.O. Kesto
313, Beijing, Ĉinio

Redakcio de El Popola Ĉinio
Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN



* S-ro Manuel Romero, Arzob Apaolaza, 32-Ent. A. Zaragoza Hispanio, 58-j., oficisto, kor. kun ĉinaj kaj japanaj amikinoj, pri kulturaj aferoj kaj bona amikeco.

* S-ro Slavomir Dycha, Str. Kruczkowskiego 20/29, 20-468 Lublin, Pollando, scienca protektanto de la Lublina Scienca Medicina E-rondo, dez. kor. kun ĉinaj E-kuracistoj.

* Pawet Paruzel, ul. Swierczewskiego 35, PL-42680 Strzybnica, Pollando, 25-j. kun geamikoj de la

tuta mondo, pri muziko, gramofonaj diskoj, prospektoj, turismo, junularaj problemoj.

* S-ro Heriau Maurice, 64, Rue des Moulins B3, 21000-DIJON, Francio, kun ĉina Esperantisto, pri ĉiaj temoj.

* Maria Di Maso, V. Michelstaedter, 3H1Fo Gozizia, Italio, kun ĉinaj junuloj.

* De Salvador Enrico, via Montebello, 2,32036 Sedico/Belluno, Italio, kun geamikoj por interŝanĝi bildkartojn kaj poŝtmarkojn.

* (1) Jaime Arturo Ruiz R., Avenida Paez, Calle Gvadalupe Quinta Villa Paz, urb. El Paraiso Caracas 102, Venezuelo; (2) Edgard Avidio Neiza Godoy, Apartado

76626 Caracas 107, Venezuelo, kiuj deziras interŝanĝi opiniojn kun gesamideanoj de la tuta mondo.

* Victoria Isabela Popescu, Str. Columvelor nr. 7, ap.1 Sector 4, 700 98 Bucuresti, R. S. Rumanio, kun ĉinaj geesperantistoj pri vegetarismo, akupunkturo.

* Ronald Schindker, DDR-209 Templin, W.-Pieck-Str. 44, deziras korespondi kun ĉinaj esperantistoj pri poŝtmarkoj kaj bildkartoj.


* Ramiro Restrepo, Transv 34 sur No. 32B-23 Envigado-Antioquio, Kolombio, volas korespondi kun ĉinaj geesperantistoj.

* Stanislavo PLACHTA, str. Klasztorna 47 PL-32-350 Pilica,

Lin Daiyu (porcelanajo), heroino en la ĉina fama antikva romano "Songô en Ruĝa Buduaro"

Farita de **CHEN ZHONGMING**

Fotita de **ZHAO ZHISHUO**





Al laboro





Tetinkejo en mateno

Mateno de Guangzhou


de WU FUQIANG

La urbanoj de Guangzhou (Kantono) havas kutimon frue ellitiĝi. Je la tagiĝo jam viglas homoj sur stratoj kaj tiel komenciĝas la taga vivo. En bazaroj mastrinoj aĉetas freŝajn legomojn; al fabrikoj kaj institucioj biciklas laboristoj kaj oficistoj de la unua skipo; en parkoj kun multaj arboj kaj freŝa aero oni promenas aŭ ludas pilkojn aŭ faras aliajn sportojn; kaj en izolaj kvietaj lokoj gelernantoj relernas siajn lecionojn. Ĉio ĉi tio faras la parkan urbon viveplena.

En parko



Purigistinoj



Legado

ABONTARIFO DE E. P. Ĉ.

(Validas ekde la 1-a de Majo 1980)

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj	Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	\$A	5.70	9.60	14.40	Svisio	SF	10.50	17.60	26.40
Aŭstrio	Sch	81.60	136.00	204.00	Usono	US\$	6.00	10.00	15.00
Belgio	BF	180.00	300.00	450.00	Kanado	Can\$	7.20	12.00	18.00
Britio	£	3.00	5.00	7.50	Por aliaj landoj en Eŭropo:				
Finnlando	FMK	24.00	40.00	60.00	£	3.00	5.00	7.50	
Francio	FF	26.40	44.00	66.00	US\$	6.00	10.00	15.00	
FR Germanio	DM	10.80	18.00	27.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj				
Italio	Lit	5280	8800	13200	Latin-Ameriko:				
Japanio	Yen	1400	2800	4000	£	2.20	3.60	5.40	
Nov-Zelando	NZ\$	6.70	11.20	16.80	US\$	4.30	7.20	10.80	

Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN

P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

Pollando, kun ĉinaj esperantistoj pri diversaj temoj.

* S-ro Bovmal Camille, Rue du Cinigov No 28, F 66300 Terrats, Francio, 59-j., emerita oficiro, kor. kun ĉina esperantisto kaj interesas pri velŝip-navigado, lingvo kaj muziko.

* Gerrit Nieuwenhuis, 59-j. esperantisto, Irenestraat 11, 6707 CT Wageningen, Nederlando, kun ĉinaj kaj japanaj esperantistoj.

* Prof. J. J. Neumann, P.O. Box 9451, San Diego, CA. 92109, Usono, kun ĉinaj esperantistoj.

* Jacques LINDAU, 4, rue de l'Ancien Champ de Foire, F-57100 THIONVILLE, Francio, kun ĉinaj esperantistoj.

* Maria Diehl, 20-j., 7 Quellen 45, D-4193 Kranenburg FR Ger-

manio, kun ĉinaj esperantistoj pri ĉina vivo.

* Demeter Kalman, 43-j., mekanikisto, Str. Dealului nr. 13 bl. 26/49, R-4000 Sfintu Gheorghe, Rumanio, kun ĉinaj esperantistoj pri radio-televideo kaj elektroniko.

* Panczakiewicz Waldemar, ul. C. Skodowskiej 50/52, 85-088 Bydgoszcz, 21-j., studanta biologion en la Jagiellona Universitato en Krakov, kor. kun esperantistoj pri ĉiuj temoj.

* Peter Bartaloš, 8400 Ajka Futo u. 2 111/12, Hungario, 28-j., ministro, deziras interŝanĝadi papiliojn kun ĉinaj esperantistoj.

* S-ro Carl-Ewerth Grahn, Havstenavagen 9 B, S 541 43 Skovde, Svedio, 69-jara pensiulo deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.


* Acabar Sedaghat, Ivanprast, Cucheshfan, Rasht, Irano, 26-jara fraŭlo deziras korespondi kun ĉinaj junaj geesperantistoj.

* S-ro Rene Denis, Apdo. Postal 89, Bosques Echegaray, Meksikio, 34-jara deziras korespondi kun ĉinaj esperantistoj por interŝanĝi poŝtmarkojn.

* S-ro Rudolf Kratzmann, Karl Schmidbauer, Str. 5, 8399 Griesbach im Rottal, FR Germanio, 66-jara, kor. kun esperantistoj pri interŝanĝo de poŝtmarkoj.

* Alli Hageman, Narcisstrato 17, 4645 CP PUTTE (NB), Nederlando, 55-jara, volas kor. kun geesperantistoj el Ĉinio.

* Idile Carpentier, Rue du Chateau, Esquerchin, 59500 Douai, Francio, deziras korespondi kun ĉinaj geesperantistoj.



Quanzhou

Antikva urbo Quanzhou

de XIAO XUESHENG

ANTAŬ pli ol 1,200 jaroj, kiam ĉinaj kaj eksterlandaj karavanoj vojaĝadis inter Ĉinio kaj okcidentaj landoj sur la silka vojo en nordokcidenta Ĉinio, malfermiĝis ankaŭ mara vojo en sudorienta Ĉinio. Ĝi vigliĝis tagon post tago kaj, post Tang-dinastio (618-907 p. K.), fariĝis ĉefa vojo inter Ĉinio kaj aliaj landoj, anstataŭante la silkan vojon. Quanzhou (Kjuangou) estis unu el la plej famaj havenoj sur tiu vojo.

La nomita urbo nur je 10 km. for de la maro situas en la mezo de la marborda linio de Fujian-



(Fugian)-provinco kaj estas grava trairejo inter la suda kaj norda partoj de la provinco. Ĝi estas ankaŭ fame konata antikva kultura urbo en suda Ĉinio.

Iu poeto de Tang-dinastio priskribis ĝin per jenaj vortoj: "Diverslandanoj viglas en la urbo." Evidente, en Tang-dinastio tiu urbo jam fariĝis komerca


centro. La floranta periodo de tiu urbo ĉu en martrafikado ĉu en komercado estis la dinastioj Song (960-1279 p. K.) kaj Yuan (1279-1368 p. K.). Tiam Quanzhou havis kontakton kun ĉ. 100 landoj kaj regionoj de Azio kaj Afriko. Ĝia plej longa naviga linio etendiĝis ĝis la bordo de Mediteraneo. Siatempe Quanzhou estis glorie envicigita inter la plej grandaj komercaj havenurboj, same fama kiel Aleksandrio de Egiptio. En la jaro 1974, sub strando ĉe la golfo de la urbo oni elterigis ŝipon de Song-dinastio kaj trovis en la



holdo grandan kvanton da objektoj. Ĝi estas historia atestajo pri amikaj kontaktoj de la ĉina popolo kun aziaj kaj afrikaj popoloj kaj ankaŭ pri prospero de transmara komercado de la antikva Quanzhou.

Poste iom post iom malprosperiĝis la transmara komercado kaj mara trafikado de tiu urbo pro militado en la lastaj jaroj de Yuan-dinastio, malpermeso al navigado en la komenca periodo de Ming-dinastio (1368-1644 p. K.) kaj invadoj de japanoj kaj okcidentaj koloniistoj. Houzhu-haveno, antikva distribua centro de ekstera komerco, nun servas kiel provizora vartransporta punkto inter Quanzhou kaj Xianggang (Hongkong). Post nelonge tiu linio malfermiĝos oficiale. La haveno post laŭplana konstruado posedos jaran en- kaj elportan kapaciton de 2,000,000 tunoj.

Kiel antikva kultura urbo ĝi ankaŭ havas multajn valorajn kulturajn restaĵojn. Qingjing-templo, konstruita en la 11-a jc., prezentas fortan influon de araba arkitektura stilo. Ĝiaj ark-




La Orienta kaj Okcidenta Pagodoj de Quanzhou

pinta portalo alta je 20 metroj kaj ŝtonmuro antaŭ sutro-altano estis bone konservataj ĝis nun. Ĝi estas unu el la plej fruaj islamaj konstruaĵoj nun konservataj en Ĉinio. La fame konata antikva Kaiyuan-templo unue konstruiĝis en la 7-a jc., poste ruiniĝis kaj estis rekonstruita en la 14-a aŭ la 15-a jarcento. Ĝi estas konstruaĵo grandioza. Sur granda trabo en la ĉefa halo de la templo estis delikate gravuritaj 24 flugantaj muzikistinoj kun bivo, fluto kaj aliaj instrumentoj en la manoj. Tiaj belaj figuroj estas maloftaj en niaj temploj. Respektive sur la orienta kaj okcidenta placoj staras du ŝtonpagodoj de Song-dinastio.


La orienta pagodo altas je 48 metroj kaj la okcidenta je 44 metroj. Ili ambaŭ estas en formo de okangula kvinetaĝa pagodo kaj kun diversaj bele skulptitaj reliefoj sur la granitaj korpoj. Laŭ legendo Wangchuan-valo proksime de Quanzhou estis fiŝreto, kaj la urbomuro de Quanzhou estis karmo, kaj la fiŝo kovrita de la reto ne povis sin turni. Por savi ĝin, la urbanoj konstruis la du pagodojn por levi la reton, tiel ke la fiŝo sin liberigis el sub la reto. De tiam prosperiĝis la urbo. La legendo estas tre interesa kaj montris belan idealon de la Quanzhou-a popolo.

Tamen, en la lastaj cent jaroj antaŭ la Liberiĝo la urbo Quan-

Teknikistoj de la Quanzhou-a Fabriko de Elektronikaj Aparatoj en laboro



En Universitato por Elmigrintaj Ĉinoj en Quanzhou



zhou ne prosperiĝis. Sub la peza premado de feŭdismo, burokrat-kapitalismo kaj imperiismo, ĝia ekonomio stagnadis. La tuta urbo havis nur unu relative grandan entreprenon — la 100-kilovattan elektrejon por lumigado. Krome funkciis simplaj

presejo, teksejo, muelejo kaj aliaj metiejoj. En la jaroj tuj antaŭ la Liberiĝo, ĉiuj entreprenoj de tiu urbo depresiĝis kaj ĉie regis malprospero. Miloj da homoj vagadis sur la stratoj kiel almozuloj; iuj eĉ forlasis siajn edzinon kaj gefilojn kaj vojaĝis

eksterlanden por serĉi vivrimedojn.

La hodiaŭa fizionomio de la urbo estas tute alia. En ĝi sin trovas pli ol 280 mez- kaj malgrandaj fabrikoj kun ĉ. 50,000 laboristoj kaj oficistoj, inkluzive fabrikojn de elektro, maŝinoj, elektronikaj aparatoj, kemiaĵoj, manĝaĵoj, tekstilaĵoj, malpeza industrio, konstrumaterialoj kaj trafikiloj.

Mi vizitis kelkajn fabrikojn. La Quanzhou-a Sukerfabriko okcidente de la urbo estis konstruita en la jaro 1954. Fabrikestro Lin Ziyu rakontis al mi, ke la malnovaj ekipaĵoj de la fabriko jam ne povis kontentigi la bezonon de la nuna produktado. Laŭ la trijara plano oni reformis la fabrikon per novaj ekipaĵoj dum ne-produkta sezono ĉiujare. Post la reformado la taga sukerprema kapablo de tiu

fabriko nun altiĝis de 500 ĝis 1,500 tunoj. En laborejo mi jam vidis, ke la novaj ekipaĵoj estas jam instalitaj kaj laboristoj intense faras finan laboron por renkonti la venontan sukerpreman sezonon. En salono de la Quanzhou-a Fabriko de Elektronikaj Instrumentoj mi vidis fotojn de produktaĵoj pendantajn sur muro. Tiuj produktaĵoj de simpla megafono ĝis preciza mezurilo antaŭe ne produktita en Ĉinio montris la vojon iritan de la fabriko depost ĝia fondiĝo en la jaro 1966. En la jaro 1979 tiu malgranda fabriko kun pli ol 200 laboristoj energie plenumis 7 taskojn donitajn de la ŝtato por provfabriki novajn produktaĵojn. Specimenoj de la projektitaj maŝinoj estis faritaj jam en la sama jaro. La fabriko de metiartaĵoj, kvankam en malvasta domo kaj malbonaj kondiĉoj, multigis jaron post jaro la specojn kaj kvanton de produktaĵoj. Kiam vi vidas bambuplektaĵojn, lignogravuraĵojn, ŝellakaĵojn, belajn lanternojn k.a. faritajn de majstroj, vi ne volas turni la okulojn de ili. Oni diris, ke tiuj metiartaĵoj ĝuas grandan famon sur la en- kaj ekster-landa merkatoj.

En la pasinteco oni ofte mokis la mizeron de konstruado de la urbo je "du turoj kaj unu strato". Nun en la urbo troviĝas 21 stratoj, plivastigitaj kaj pavimitaj per tajlitaj ŝtonoj. La suda-norda strato tra la urbo, longa je 3 kilometroj kaj larĝa je 46 metroj, estas ekkonstruita. Al la malsupra parto de Jinjiang-rivero preterpasanta la urbon en sudo oni konstruis 20-kilometran barajon por evitigi al ĝi inundon dum la pluvoza sezono. Baiyuanqing-lago, kiu estis tre malpura en la pasin-

teco, nun jam transformiĝis en pitoreskejon kun klara akvo. Ĉirkaŭ la lago staras la domo de la urba registaro, banko, kultura domo de laboristoj, biblioteko, teatro, loĝdomoj kaj hotelo por elmigrantaj ĉinoj. Por kontentigi la bezonon de turisma afero, oni konstruas 12-etaĝan hotelon ĉe la lago.

Quanzhou estas fame konata hejmloko de elmigrantaj ĉinoj. Laŭ statistiko, elmigris ducent mil Quanzhou-anoj, kaj nun en la urbo loĝas pli ol centmil revenintaj elmigrintoj. Nun, ĉiutage la Quanzhou-a Hotelo por Elmigrantaj Ĉinoj akceptas multajn elmigrantajn ĉinojn, el kiuj iuj venas por viziti siajn parencojn, aliaj por turisma celo kaj triaj por trakti kunan funkciigadon de fabrikoj, volante fari

kontribuon por la modernigo de sia patrolando. Nordoriente de la urbo troviĝas Universitato por Elmigrantaj Ĉinoj kun pli ol 480 studentoj de 6 sciencaj kaj inĝenieradaj fakultatoj. La universitato donas multe da oportunoj al tiuj studentoj revenintaj el eksterlando, Xianggang kaj Aomen kiel en la ĉiutaga vivo tiel en la lernado. Ĝi tre atentigas fremdlingvan instruadon, por ke iuj el la studentoj facile akiru laboron post reveno al la loĝataj landoj. Krome oni preparas starigon de nova kurso pri komputeroj, por ke ĉiuj studentoj posedu fakan scion kaj scipovon uzi ilin. Ĉio tio sentigas al la studentoj varmon de la patrolando kaj liberigas iliajn gepatrojn eksterlande de zorgoj.



La Quanzhou-a Pupteatro en provludado



Antikva tombo kun freskoj

de WU RENGXIANG

NORDOKCIDENTE de la antikva urbo Jiuquan kaj oriente de urbo Jiayuguan, ĉe kiu finiĝas la Granda Muro, en nordokcidenta Ĉinio, troviĝas gobio, kie dislokiĝas antikvaj tomboj de la periodo de la 2-a jarcento a. K. ĝis la 5-a p.K. Tiu areo longas de sudo al nordo 20 kilometrojn kaj larĝas 3 kilometrojn.

Kial en la dezerto troviĝas tiel multaj antikvaj tomboj? Ĉar tiun lokon trairis, jam de Han-dinastio antaŭ pli ol 2,000 jaroj, la Silka Vojo kondukanta al Mez-Azio kaj Eŭropo, kaj tie regis prospero en ekonomio kaj kulturo. En la Orienta Jindinastio en la kvara jarcento, okazis sinsekvaj militoj en centra Ĉinio, kaj diversaj gentoj norde de Changjiang (Jangzi)-rivero fondis 16 separatismajn regnojn, kiuj estis unuigitaj nur en 439 p. K. en Nordan Weidinastion. Tiu periodo en la ĉina historio estas nomata Periodo de XVI Regnoj. Pro politika ĥaoso en centra Ĉinio kaj relativa politika stabileco en tiu regiono, multaj intelektuloj fuĝis al tiu loko. Kaj tiu periodo ludis tre gravan rolon en la evoluado de la unueca multnacieca ŝtato de Ĉinio kaj la kunfandiĝo de diversaj kulturoj. Post la unuiĝo de Ĉinio, ĝia politika centro denove translokiĝis al la centra parto de la lando kaj en tiu loko lasiĝis multaj historiaj restaĵoj.

Por koni la historion kaj kulturon de tiu regiono, ĉina konkerna institucio faris en 1977 arkeologian prifosadon kaj malkovris grandan nobelan tombon de Okcidenta Liang-regno (405-420 p.K.). Tiu granda tombo kun freskoj de relative alta arta nivelo estas la unua en sia speco trovita en la koridora regiono okcidente de Huanghe-rivero (Flava Rivero) en Gansu-provinco. Dank' al la malkovro de tiu tombo, pliriĉiĝis nia kono pri la kultura kaj arta historio de Ĉinio. Ĝiaj freskoj prezentas ŝtupon interligantan la tradician arton de Han-dinastio (206 a. K.-220 p. K.) kaj Wei-dinastio (220-265 p.K.) kaj la pikturan stilon de la Periodo de Sudaj kaj Nordaj Dinastioj (420-589 p. K.). Ĝi ankaŭ estas valora referenca materialo por studo pri la historio de la freska arto de ŝtonaj kavernoj de Gansu-provinco, kiu estas riĉa je antikvaj budhismaj artaĵoj.

Tiu antikva tombo kaŝiĝis sub tavolo de ŝtonetoj en dezerto, 12 metrojn sub la tersurfaco. De la tersurfaco al la pordo de la tombo kondukas dekliva vojo kun longeco de 33 metroj, sur kiu oni povas vidi la simblan brikan portalon. La ĉambroj de la tombo estas konstruitaj el specialaj brikoj sen mortero. La antaŭa ĉambro estas kvadrata kaj la posta oblonga. Ilin interligas brika koridoro.

La antaŭa ĉambro similas al ekspozicia ĉambro kun muroj plenaj de koloraj freskoj. Sur la plafono estas pentritaj blankaj multpetalaj lotusfloroj. La freskoj estas aranĝitaj en kvin partoj unu sur alia pri scenoj en la ĉielo, sur la tero kaj en la homa mondo. La supraj du partoj estas bildoj pri mitoj kaj en ĉiuj kvar flankoj estas drakokapo etendiĝanta de supre, kaj ambaŭflanke de ĝi estas ŝvebantaj nuboj. Sub la drakokapo sur la okcidenta muro troviĝas luno kaj diino Xiwangmu kaj en la luno kuŝas blanka bufo. Laŭ ĉina mito, antaŭe vivis fortulo nomata Yi. Li akiris de Xiwangmu drogon de senmorteco. Lia edzino ŝtele englutis kaj fariĝis feino, kaj poste flugis en la lunon. La bufo estas ŝia transformajo. Xiwangmu en ĉina mito estis rigardata kiel la plej altranga diino en la okcidento kaj ankaŭ diino de ĉiopo-vo kaj senmorteco. En la fresko, ŝi sidas sur arbego, sub kiu kuŝas Kunlun-montaro, kiu prezentas la plej altan lokon, kie Xiwangmu loĝas. Dekstre de la arbo staras naŭ-vosta ruĝa vulpo. Tiu besto estas videbla nur tiam kiam la imperiestro estas humana ne nur al la homoj sed ankaŭ al la bestoj. Maldekstre de la arbo staras tripeda birdo, kiu venas al la homa mondo tiam, kiam la imperiestro estas fileca, bonkora kaj favora al la popolo kaj ne emas mortigi



Reĝo Tang liberigas birdojn.

vivestajojn. Sur Sanwei-monto estas tri bluaj birdoj, kiuj prenadas manĝaĵojn por Xiwangmu. Sub la drako sur la orienta muro estas pentritaj la suno kaj dio Dongwanggong. En la suno estas tripeda birdo. Se la suno kaj la luno estas brilaj, tiam do paco regas en la mondo, ĉio prosperas kaj la homoj ĝuas longan vivon. Dongwanggong estas la plej alta dio en la oriento, aspektanta kiel majesta monarĥo. Sub la drakokapo sur la suda muro estas pentritaj blanka cervo, flugilhava homo kaj bildo pri la reĝo Tang, kiu lasis birdojn liberaj. Blanka cervo estas rigardata kiel besto longviva kaj videbla por la korteganoj kaj popolanoj, se la reĝo estas fileca kaj favora al la popolo. La flugilhava homo prezentas virinon libere flugantan, kiu figure montras al ni la ĝeneralan deziron de la regantoj flugi en la ĉielon dum la periodo de la dinastioj Wei kaj Jin (220-420 p.K.). Oni diras, ke la reĝo Tang estis tre humana. Foje li vidis, ke oni etendas ĉiuflanke retojn por kapti birdojn. Li timis, ke tiamaniere ĉiuj birdoj en la mondo estos kaptitaj je la fino, tial li ordonis, ke oni forprenu la retojn en tri flankoj kaj li preĝis: Birdoj en la mondo, flugu dek-

stre aŭ maldekstre laŭ via volo! Se vi ne obeos min, vi falos en mian reton. Informiĝinte pri tio, la nobeloj ĉiuj diris, ke la reĝo Tang estas ekstreme humana, ke eĉ birdoj kaj bestoj ricevis favoron de li. Sub la drakokapo sur la norda muro vidiĝas bildo de mita ĉevalo kun blanka korpo, ruĝaj kolharoj kaj ore flavaj okuloj. Oni diras, ke homo kiu rajdis tiun senmortan ĉevalon povas vivi 3,000 jarojn, kaj la mita ĉevalo povas aperi en lago, se la reĝo estas humana. La mita ĉevalo en la bildo estas tre sukcese pentrita. Ĝi galopas en la aero henante kun levita kapo kaj flirtantaj kolharoj.

La fresko en la plej malsupra parto enhavas fean testudon, kiu simbolas la teron. La freskoj en la tria kaj kvara partoj prezentas la nobelan vivon de la mortinto en la tombo kaj montras, ke li havis vastan bienon kaj multajn servistojn kaj sklavojn. Plej rimarkinda inter la freskoj estas tiu en la tria parto pri la hejma plezura vivo de la mortinto. En la maldekstra parto de la fresko, li en kortegana kostumo, genue sidas sur kuseno, kun polvoforigilo en la maldekstra mano. Super lia kapo vidiĝas baldakeno kun kurba tenilo,

premio al meritoplena altranĝulo. Post lia dorso staras unu servisto kaj unu servistino. Antaŭ li staras kvadrata tablo kun kurbaj piedoj. Sur la tablo troviĝas pokalo, vinkulero kaj sub ĝi estas vinvarmiga vazo. Ambaŭflanke de la tablo staras po servisto. Maldekstre de la tablo muzikisto frapas tamburon per bastoneto, eble li estas direktanto de la muzikistaro. Dekstre de la tablo du dancistinoj en vestoj en ruĝaj, flavaj kaj verdaj strioj prezentas ventumilan danccon. La pli malgranda el ili kun du kvadrataj ventumiloj en la manoj sin turnas tiel rapide, ke flirtas ŝiaj jupo kaj haroj. La alia dekstre de ŝi flanken paŝanta kun levitaj manoj markas taktojn per manklakado kaj kantas dancante. La muzikistaro konsistas el kvar personoj: unu viro ludas *ĝeng-on* (plukinstrumento kun dekoj da kordoj sur oblonga lignotabulo), unu virino ludas kvarkordan biron, unu muzikistino ludas fluton kaj alia frapas tali-tamburon per siaj manoj.

Malsupre de la muzikistaro estas akrobata sceno: du nudpiedaj virinoj en kolorstria vestoj iras sur siaj manoj sur longa tapiŝo.

Maldekstre en la kvara parto sur la okcidenta fresko la bildo prezentas scenon de ekskurso de la familianoj de la mortinto per bovĉaro. Maldekstre vidiĝas ĉaroj por transportado. La ĉaristoj en malsamaj hararanĝoj kaj kostumoj eble apartenas al tri malsamaj naciecoj: ŝjanbej-o kun alta nazo kaj enfalintaj okuloj, du ĉjangoj kun longaj

haroj neligitaj kaj hano kun hartubero.

En la tria parto de fresko sur la suda muro prezentiĝas agrikulturado. Meze estas biendomaro ĉirkaŭata de arboj kaj ĉirkaŭe de ĝi estas scenoj de plugado, erpado kaj grena ventumado. En fresko en la kvara parto sur la suda muro trovi-

ĝas granda arbo, sur kies branĉoj vidiĝas papago kaj simio, sub la arbo nuda virino kolektas herbojn kaj ĉirkaŭe de la arbo estas fruktarba ĝardeno.


Dekstre en la fresko en la tria parto sur la norda muro estas bovĉaro de la mortinto en la tombo. Tia veturilo estis uzata de nobeloj en Jin-dinastio (265-420 p. K.). Apud la ĉaro estas sceno de produktado. En la mezo estas arbo, sur kies branĉo staras birdo rigardanta malsupren. Sub la arbo estas viro kun barbeto kvazaŭ loganta birdon. Dekstre en la fresko en la kvara parto sur la norda muro estas du ĉevaloj manĝantaj el trogo. Maldekstre estas vasta biendomaro kun duonmalfermita kortopordo. En la pordo staras malgranda pordisto. En la korto troviĝas alta reduto kaj ekster la korto estas framoj kaj nesto por kokoj, kaj ankaŭ aro da kokoj kaj interbatalantaj kokoj. Vidiĝas ankaŭ morusarboj kaj virinoj kolektantaj la foliojn. Maldekstre en la fresko prezentiĝas kuirejo kaj sceno pri buĉado de bovo kaj porko. Sur granda bretaro kuŝas aŭ pendas kokoj, fazanoj, hundoj, birdoj, fiŝoj kaj viandaĵoj. Apud ĝi staras du gardantoj.

Ambaŭflanke de la tombo-pordo en la kvara parto sur la orienta muro troviĝas po garda hundo. Maldekstre estas bovaro kaj paŝtisteto, kaj dekstre estas kuirejo kun bretaro por kuirilo, forno kaj ligna putoaperturo. Antaŭ la forno virino estas metanta brullignon en ĝin.

La streko de la freskoj estas fortaj, lakonaj kaj lerte faritaj, la koloroj en ili estas helbelaj. Ili plene montras al ni la eminentan arton de la pentristoj sennomaj.



Erpado



Papago, simio kaj virino



Vicĉefministro Deng Xiaoping interparolas kun M. Ali.



La monda boksa ĉampiono Muhammed Ali en Beijing

“Muhammed Ali — Popola Ĉampiono” kaj “Muhammed Ali — Venkinto” estas du biografiaj libroj pri la usona boksa ĉampiono Muhammed Ali eldonitaj de Usono kaj varme akceptataj de la legantoj, precipe de junuloj. Tiu ĉampiono, kiu ĝuas grandan famon en la mondo, venis al Beijing (Pekino) je la

19-a de decembro, 1979, por fari unutagan viziton.

Apenaŭ li descendis de la aeroplano, li estis varme akceptata de ĉinoj en ripozhalo de la aerodromo.

“Vi estas nia bonvena gasto. Estas bedaŭrinde, ke vi restos en Ĉinio nur unu tagon, tre mallonge,” diris Song Zhong, vic-

prezidanto de la Ĉina Olimpika Komitato.

“Kvankam mia restado estos mallonga, tamen mi ne povos ne havi ŝancon ĝui ion bongustan?” humure diris Ali. “Antaŭlonge mi jam informiĝis pri la famo de la rostitaj Beijing-anasoj.”

“Manĝinte Beijing-anason, vi fariĝos pli forta kaj akiros pli



Gesinjoroj Ali en la Imperiestra Palaco de Beijing

grandajn sukcesojn en boksaj konkursoj.”

“Jes, ne nur Beijing-anaso sed ankaŭ la amika ĉina popolo donos al mi pli grandan forton . . . ”

Ali havas profundan amikecon por la ĉina popolo. Jam en sia infaneco li revis viziti Ĉinion kaj nun lia deziro realiĝis. Li diris: “Mi tre respektas la ĉinan popolon, kiu tiel multe diferencas de aliaj popoloj de la mondo.”

Je la tria horo posttagmeze de la sama tago, Ali kaj lia edzino vizitis la Muzeon de la Imperiestra Palaco. Li tre admiris la ĉinajn antikvajn konstruaĵojn. Montrante la grandiozan palacon li diris: “En la pasinteco la imperiestro sola okupis tiel multe da domoj, dum la popolo vivis en mizero . . . ” Sin fotante antaŭ iuj famaj konstruaĵoj kaj raraj artaĵoj, li diris denove: “Tamen ĉio tio jam forpasis. Mi fotas min por teni la pasintecon en mia memoro.”

Je la 5-a horo posttagmeze la altstatura Ali venis en la akceptejon de la Popola Halo. Kiam ĉina vicĉefministro Deng Xiaoping kun gaja mieno paŝis el post ekrano, Ali emocie iris renkonte al li. Premante la grandan manon de Ali, vicĉefministro Deng diris: “Bonvenon al vi, la ĉina popolo bonvenigas vin!” “Dankon!” Ali ĝoje faris unu paŝon antaŭen kaj varme brakumis vicĉefministron Deng dirante: “Ne koleru pro mia krudeco, mi pensas, ke mi ne povas sufiĉe esprimi mian senton sole per manpremo, kaj tial mi volas brakumi vin!”

Vicĉefministro Deng diris: “Via ĉifoja vizito estas tre hastata. Vi estos bonvena ankaŭ en la venonta jaro. Nun en Ĉinio ankoraŭ ne estas bokso, kaj ni devas lerni de vi.” Ali esprimis sian volon, ke en 1980 li venos al Ĉinio kun du helpantoj por fari prezentadon por la ĉina popolo kaj kulturi ĉinajn boksistojn, ke ili povu partopreni en la Olimpikaj Ludoj en 1984.



Interesaj Neĝleporoj

La neĝleporoj vivantaj sur Xing'an-montaro de nordorienta Ĉinio estas unu el la raraj bestoj protektataj de la ŝtato. Ili povas, laŭ la malsamaj sezonoj, trifoje ŝanĝi la koloron de siaj haroj por sin defendi kontraŭ atako de rabobestoj. Tian vivipovon ne havas ĉiuj aliaj specoj de leporoj.



Kiam alproksimiĝas printempo kaj ekdeglas la neĝo, la neĝleporoj defaligis siajn densajn harojn sinsekve de sur la dorso, kapo kaj kvar membroj kaj kreskigas anstataŭe malhele grizajn mallongajn harojn. Sub la protekto de tiu koloro la neĝleporoj aktivis en verdaj arbaroj. Kiam venas aŭtuno kaj velkiĝas la kreskaĵoj, iliaj haroj flave brunigis, kvazaŭ ili estus vestmaskitaj. En tiu tempo iliaj haroj prezentas la saman koloron kiel la velkintaj herboj kaj defalintaj folioj, tial ili povas sekure vivi en la vasta kamparo kaj steparo. En vintro, kiam ĉie estas glacio kaj neĝo, ĉiuj iliaj haroj fariĝas neĝblankaj, escepte de nigraj haroj sur iliaj orelopintoj, tiel ke ili estas preskaŭ nerimarkeblaj en neĝejo.

El iliaj haroj kaj peltoj oni faras vestaĵojn, teksaĵojn, penikojn kaj aliajn. Precipe post la sunperiodo Neĝeto ilia felo estas tre valora kun blankaj haroj aparte glataj kaj longaj, densaj, molaj kaj varmokon-servaj. Kiel alia leporajo, viando de la neĝleporo karakteriziĝas per multaj proteino, malmulta graso, nutrivo kaj bongusteco. Ĝi diferencas de alia leporajo nur per tio, ke ĝia gusto similas tiun de kokaĵo sed ĝi estas multe pli delikata ol la lasta, tial la neĝleporajo havas renomon en la internacia merkato.

Vivipovo de antikva lotussemo

Laborantoj de la Beijing-a Botanika Ĝardeno sub la Ĉina Akademio de Sciencoj elfosis nemalmultajn grajnoj de antikva lotussemo en sekigita lageto de la vilaĝo Xinquanpaoziton de Liaoning-provinco. Post mezurado oni konstatis, ke tiuj grajnoj kaŝitaj je 1 aŭ 2 metroj sub la tersurfaco jam trapasis 915 (± 80) jarojn. Sciencistoj donis al ili sufiĉe da akvo kaj ilin tenis en temperaturo de 25°C. La semograjnoj ĝermis post tri tagoj kaj poste floris kaj fruktis.

Lotusa semograjno mem estas tre bona hermetika ujo en kiu troviĝas konvena kvanto da diversaj gasoj. Grenejo projektita laŭ ĝia strukturo kredeble taŭgas por longe konservi semojn kaj grenon. La fenomeno,



ke la protoplasmo de la ovolo de lotusaj semograjnoj ne difektiĝis dum mil jaroj kaj en konvenaj kondiĉoj la ĉelo ankoraŭ povas disduiĝi, estas tre inspira por studentoj pri dormo kaj generado de plantoj kaj pri genezo de vegetaĵoj.

Duonfiŝoj

En la meza parto de Daluo-rivero en la protektata natura regiono de Huaping nordokcidente de la urbo


Guilin de Guangxi (Guanghi), vivas speco de duonfiŝo simila al karpoo. Unu flanko de ĝia korpo estas konvekso kaj kovrata de skvamoj dum la alia estas plata kaj senskvama. Tiaj fiŝoj kutimas aktivi en paro kiam ili naĝas supren kontraŭ rapida fluo, ili naĝas pare kunpremiĝante je la senskvama flanko. Pro tio, lokaj popolanoj rigardas tian fiŝon kiel simbolon de fidela amo.

KARIKATURO



Varmenergio


Pentrita de MIAO DI



Memkritiko Pentrita de WU RONGFANG

Ĉu ronda aŭ kvadrata estas pli bona?

Pentrita de PAN SHUNQI



1979

PLIPRODUKTO DE FERRO KAJ ŜTALO EN ĈINIO

En 1979, la totala ŝtala produktokvanto de Ĉinio atingis 34,430,000 tunojn kun neta pliiĝo je 2,650,000 tunoj, t.e. 8.3% kompare kun tiu de 1978, la totala produktokvanto de ŝtalaj materialoj atingis 24,940,000 tunojn kun neta pliiĝo je 2,860,000 tunoj, t.e. 13% kompare kun tiu de 1978; la totala produktokvanto de krudfero atingis 36,696,000 tunojn kun neta pliiĝo je 1,900,000 tunoj, t.e. 5.4% kompare kun tiu de 1978.

En la lasta jaro, la ĉina fera-ŝtala industrio atingis bonan sukceson en diversaj flankoj inkluzive de multigo de feraj kaj ŝtalaj specoj, altigo de produktaja kvalito kaj plimultigo de profito.

EKFUNKCIAS GRANDA HIDROELEKTREJO WUJIANGDU

La hidroelektrejo Wujiangdu sin trovas en Zunyi-gubernio de Guizhou (Gujōu)-provinco. Ĝia riverbarajo longa je 360 metroj kaj alta je 165 metroj estas la plej alta digo de nia lando.

La hidroelektrejo, post finkonstruo, havos tri hidroturbinajn generatorajn kompletojn, kun unuopa

kapacito de 210,000 kilovatoj kaj totala kapacito de 630,000 kilovatoj, kaj ĉiujare ili povos produkti 3,340 milionojn da kilovathoroj. Unu el ili jam ekfunkciis.

RIMARKINDA ATINGO EN ŜPARADO DE ENERGIO

En 1979, Ĉinio havis rimarkindan atingon en ŝparado de energio. Pro malaltiĝo de konsuma kvanto de energio, oni sume ŝparis pli ol 20,000,000 tunojn da karbo, pli ol 1,500,000 tunojn da petrolo kaj pli ol 6,000,000,000 kilovathorojn da elektro.

500,000-VOLTA TRANS- FORMATORO SUKCESE FARITA

La unua ĉina 500,000-volta transformatoro estis sukcese farita de la Shenyang-a Transformatora Fabriko. En ekspertizado oni konstatis, ke ĝi bone funkcias kaj povas esti produktita pogrande.

La transformatoro kun pezo de pli ol 200 tunoj estas la plej granda de nia lando. Ĝia naskiĝo montras, ke la transformatora produkto de nia lando atingis novan nivelon.

EKFUNKCIIS LA VINILONA FABRIKO DE SHIJIAZHANG

La nove konstruita vinilona fabriko en la urbo Shijiazhuang jam ekproduktis en januaro. Ĝi estis

projektita de nia lando mem. Ĝi povas produkti ĉiujare 3,600 tunojn da mallongaj vinilonaj fibroj, kaj tiu kvanto ŝpinita kun enmiksitata kotono sufiĉas por teksti 50-70 milionojn da metroj da gabardino.

NOVAJ ATINGOJ DE ELEKTRONIKA INDUSTRIO

En la ĉina elektronika industrio aperis novaj atingoj. Antaŭ nelonge, laŭ ekspertizo de specialistoj kaj profesoroj de koncernaj fakoj, raratera daŭr-magneta materialo, la pura-sona prov-instrumento por laŭtparoliloj, kord-regata elektronika orgeno kaj aliaj 5 produktaj atingis avangardan nivelon de la mondo. Tio vekis atenton de elektronikaj teknikaj rondoj en kaj ekster nia lando.

Krome, ankaŭ premelekto-ceramikaj gireskopoj, elektrona komputero kun kalkula rapideco de 5 milionoj da fojoj en ĉiu sekundo, lasera transruĝa radaro kaj aliaj produktaj atingis kompare avangardan nivelon.

ĈINIO EKSPORTOS ELEKTRAJN EKIPAĴOJN AL USONO

Laŭ kontrakto farita de koncernaj fakoj de Ĉinio kaj Usono, la Chongqing-a Hidroturbina Fabriko de Sichuan (Siĉuan)-provinco de Ĉinio produktos tri hidroturbinajn generatorojn kun totala kapacito de 600 kilovatoj por Usono.

Vinberorikolta Sezono (papertondaĵo)

de SHE YUNXIANG kaj LIU JIANPING



PLI OL 4 MILIONOJ DA HOMOJ ENLOĜIGIS EN NOVAJ DOMOJ

En 1979, Ĉinio finkonstruis novajn loĝdomojn kun totala plankareo de 56,400,000 kvadrataj metroj kun pliiĝo je 50% kompare kun tiu de 1978, t.e. dekonon de la totala plankareo en la pasintaj 30 jaroj. Pli ol 4 milionoj da homoj enloĝiĝis en la novaj domoj.

UTILIGO DE SUNENERGIO EN LA INTERNA MONGOLIO

Sur stepo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio oni konstruis la unuan elektran ĉirkaŭbarilon kun sunenergia elektrofonto. En tiu barilo estas herbejo kun areo de 420 hektaroj. La barilo estas farita el pikildratoj fiksitaj sur betonaj fostoj. Alttensia elektro produktita per sunenergio estas liverata al la barilo por protekti la herbejon de brutoj. Uzado en ĉ. duonjaro montris, ke tia barilo estas malmulte kosta, longe

uzebla, sekura kaj facile mastrumebla.


PLI MULTE DA KOTONO KAJ OLEDONAJ SEMOJ VENDITAJ AL LA ŜTATO

En 1979, nia lando akiris riĉan rikolton de kotono. La totala produktokvanto de kotono pliiĝis je 50,000 tunoj kompare kun tiu de 1978. Por akceli kotonan produktadon, la popola registaro levis la prezon de kotono aĉetata de ĝi kaj tio multe stimulis la kamparanojn. En 1979 la ŝtato aĉetis sume 2,021,000 tunojn da semkotonon, t.e. je pli ol 25,000 tunoj pli multe ol la kvanto de la antaŭa jaro.

La totala produktokvanto de oledonaj semoj de la tuta lando en 1979 pliiĝis je 750,000 tunoj kompare kun tiu de 1978. Ĝis la komenco de januaro de la kuranta jaro, la tuta lando jam aĉetis 1,300,000 tunojn da oledonaj semoj, t.e. je pli ol 265,000 tunoj pli multe ol en la antaŭa jaro.



Riĉa rikolto de kotono en Fugou-gubernio de Henan-provinco



Kolektado de gumo

RIĈA RIKOLTO DE GUMO EN ĈINIO

En 1979, la totala produktokvanto de kruda kaŭĉuko de Ĉinio atingis 97,400 tunojn kun pliiĝo je 2.4% kompare kun tiu de la antaŭa jaro. Depost la Liberiĝo, la ŝtataj kultivejoj en la provincoj Guangdong, Yunnan (Junnan) kaj Fujian (Fugian) kaj la Guangxi (Guanghi)-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono de la suda parto de Ĉinio komencis kulturigi gumarbojn. Post 30-jara klopodado multe disvolviĝis la produktado de gumo en nia lando.

NOVA KARBOKAMPO TROVITA EN LA MEZO DE SHAANXI-PROVINCO

Post sesjara serĉado kaj prospektado, la 186-a Karbokampa Geologia Prospektora Taĉmento de Shaanxi (Ŝenhi)-provinco trovis grandan karbokampon en Binxian-gubernio, kun konservokvanto de pli ol 9,100 milionoj da tunoj da karbo. Tiu karbokampo kovras 1,170 kvadratajn kilometrojn, la ĉefa ekspluatebla tavolo ĝenerale dikas je 8-15 metroj, iuloke eĉ je 23.88 metroj. Ĝia karbo estas tre taŭga por produkto de industria movforto kaj por kemia industrio.


LA ESPERANTO-LIGO DE HUNAN-PROVINCO EN PREPARADO

Antaŭ nelonge fondiĝis la prepara grupo de la Hunan-a Esperanto-Ligo. Antaŭtagmeze de la 9-a de decembro, 1979, la grupo okazigis kunsidon en Changsha (Ĉangŝa), la ĉefurbo de la provinco. La ĉeestantoj parolis pri la grava signifo de la vortoj de prezidanto Mao pri Esperanto skribitaj antaŭ 40 jaroj, pri la historio de la Esperantomovado de la provinco kaj pri ĉina kaj eksterlanda Esperantomovado. Krome ili diskutis pri projektita statuto de la ligo kaj la laborplano por 1980. Ili planas fondi en la urbo postlaboran Esperanto-lernejon kaj Esperantan korespondan kurson kaj kunvoki kongreson por fondi provincan E-ligon en la kuranta jaro.


VIGLAJ AKTIVADOJ EN CHENGDU

Depost sia fondiĝo je la 18-a de novembro pasintjare, la Chengdu-a

Chengdu-aj geesperantistoj ekskursas en parko okaze de la Novjara Festo de 1980.



Prepara grupo de la Hunan-a Esperanto-Ligo



Esperanto-Ligo atingis novan sukceson en disvastigo kaj instruado de Esperanto. Esperantistoj de la Sichuan-a Universitato kaj la Sichuan-a Financa Ekonomia Instituto fondis postlecionajn Esperanto-kursojn en siaj lernejoj, kaj la instruadon plenumas Liu Hongkang kaj Ning Shouren, respondeculoj de la ligo.

Sub helpo de la ligo la Chengdu-a Universitato oficiale instruas Esperanton kiel la duan fremdan lingvon, kiun jam komencis lerni nombro da studentoj. La Chengdu-a Tagjurnalo raportis tiun novaĵon.

Je la 6-a de januaro, pli ol 60 esperantistoj de la urbo okazigis novjaran amuzkunvenon en la vidinda loko — la malnova loĝdomo de fame konata poeto Du Fu de Tang-dinastio. En la kunveno ili interŝanĝis opiniojn pri disvolvo de la Esperanta laboro, voĉlegis poemojn de Zamenhof kaj Lermontov kaj prezentis artajn programerojn.

ESPERANTO EN JILIN-PROVINCO

Memore al la 40-a datreveno de skribado de la vortoj de prezidanto Mao pri Esperanto kaj la 120-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, malfermiĝis la unua Esperanto-kurso en la postlabora universitato por kadroj de la partia komitato de la provinco, kaj en ĝi lernas 40 personoj el provincaj institucioj, ĵurnalista, kultura kaj eduka rondoj kaj fabrikoj.

FONDIĜIS PREPARA GRUPO POR LA XI-AN-A ESPERANTO-LIGO

En la lasta tagdeko de januaro ĉijare fondiĝis la nomita grupo kun Yuan Luo, vicestro de la Xi-an-a Propaganda Departemento de KPĈ, Chou Io, entomologo de la Nordokcidenta Agronomia Kolegio, Xu Jifang kaj aliaj kiel ĝiaj membroj. Krom prepara laboro ĝi starigis du Esperantajn kursojn kun pli ol 60 lernantoj.

SINDIKATA KAJ PARLAMENTA AGADOJ EN BRITIO

En 1977 starigis en Britio TUCEG (Trade Unions and Cooperative Esperanto Group). La du fondintoj komencis skribi leterojn al sindikatoj pri la valoro de internacia lingvo, kaj donis argumentojn allogajn por la sindikatoj. Post tio venis kelkaj pozitivaj respondoj. Ĝis nun al TUCEG aliĝis 84 sindikataj organizaĵoj tutlandaj, regionaj kaj lokaj; la nombro de honoraj vicprezidantoj atingis dudekon. TUCEG aranĝas ankaŭ prelegojn pri internacia lingvo en la tuta lando por sindikatoj.


Ankaŭ en Britio fondiĝis Parlamenta Grupo por Esperanto antaŭ kelka tempo kaj ĝi havis 89 parlamentanojn de ĉiuj partioj, kio estas 14% de la tuto. Ĝiaj kunvenoj okazas en la parlamentejo kaj ĉiufoje iuj aliaj parlamentanoj ricevas invitleteron. La taskoj de la grupo estas jenaj: 1) havi oficialan ŝtatan ekzamenon en Esperanto je la alta nivelo; 2) havi Esperanto-kursojn por instruistoj, organizatajn de la Ministrejo pri Edukado; 3) dissendi Esperanto-kurson per la ĝenerala programo de BBC.

LA UNUA NUMERO DE "ENTOMOTAXONOMIA" ELDONIĜIS EN ĈINIO

En oktobro de la lasta jaro aperis la unua ĉina bulteno pri entomologia taksonomio "Entomotaxonomia".

Ĝia ĉefredaktoro estas ĉina fame konata esperantisto kaj entomologo prof. Chou Io. La redakta komitato konsistas el 22 eminentaj entomologoj de Ĉinio, Usono, Danlando, Italio, Hindio kaj Japanio. Ĝi estas komuna kultivejo de ĉinaj kaj alilandaj entomologoj por aperigi disertaĵojn, informojn kaj artikolojn pri insekta taksonomio. La

La unua numero
de "Entomotaxonomia"



bulteno estas eldonata ĉefe en la ĉina lingvo kun resumoj en la lingvoj angla, franca, germana, itala, latina kaj Esperanto. Eksterlandaj sciencistoj povas skribi artikolojn en iu ajn el la lingvoj supremenciitaj, kaj la redakcio tradukos ilian ĉefan enhavon en la ĉinan lingvon.

Ĉefredaktoro Chou Io, vicĉefredaktoro Lu Jinsheng kaj redaktoro Li Kexi estas fervoraj esperantistoj. Ili deziras starigi vastajn rilatojn kun esperantistoj-entomologoj de aliaj landoj, interŝanĝi tiurilatajn materialojn kaj akceli la uzadon de Esperanto en scienco. Bv. aboni ĉe Entomotaxonomia, c/o N. W. Coll. Agr. Wukung, Shaanxi, China. La jarabono por 4 numeroj: 15 usonaj dolaroj. Por abono oni povas pagi per mono aŭ egalvaloraj novaj entomologiaj libroj en fremdaj lingvoj.

APERIS "MONATO"

Kun alveno de la jaro 1980 aperis nova unika Esperanta internacia periodaĵo "Monato". Ĝi estas eldonata anstataŭ la longe preparita tamen ne plu aperonta "Semajno".

La magazino donas al vi unuamajn informojn pri politiko, ekonomio kaj kulturo, grandparte de aŭtoroj vivantaj en la landoj mem, pri kiuj ili raportas en Esperanto. Pri fakaj temoj en ĝi verkas fakuloj, kaj la lingvo estas komprenebla. En la revuo ĉiu povas trovi siajn ŝatajn artikolojn. Abonebla ĉe TK/Stafeto, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio.

Ni esprimas sinceran gratulon al la ĉefredaktoro kaj eldonanto de "Monato" kaj deziras al ili sukceson en la laboro.

ESPERANTO-KURSO FUNK- CIIGATA DE SINDIKATO EN GUIYANG

En la fino de 1979, la Sindikato de la Fervoja Domkonstrua Sekcio de Guiyang fondis Esperanto-kurson, en kiu instruas veterana esperantisto Xiao Zibin. Nun la kurso jam finiĝis. Por daŭre altigi sian lingvan nivelon la kursanoj organizis studrondon. La sindikato planas fondi alian kurson en la kurranta jaro.



Esperanto - grupo
de la Fervoja
Domkonstrua Sek-
cio de Guiyang



Tonika Pilolo


LA blankfeniksa pilolo (Peking Pai Feng Wan) estas valora ĉina medikamento, kiu ĝuas renomon en la mondo.

30% de la nomita pilolo konsistas el nigra-osta koko kaj ginsengo, cervokorna gluo kaj aliaj tonikaj ingrediencoj. Ĝi efikas por stimuli vigecon de organoj, riĉigi sangon, fortigi korpon, bonigi memoron kaj beligi haŭtokoloron; ĝi havas rimarkindan efikon en kuracado de virinaj malsanoj kiel postakuŝa sango-reduktiĝo k.a. Pro sia riĉeco de nutraĵoj, ĝi estas uzata en la lastaj jaroj ankaŭ kiel bona medikamento por kuraci hepatiton kaj aliajn kronikajn malsanojn. Cirkulas en Xianggang (Hongkongo) kaj Aomen (Aŭmen) la diro "Agrablon venigas sano forta, prenu pilolojn blankfeniksajn!" En luksaj festenoj de Singaporo tiaj piloloj estas uzataj kiel tonika plado. Nun ili vendiĝas en Xianggang, Aomen, Singaporo, Malajzio, Tajlando, la Filipinoj, Japanio, Kanado kaj aliaj regionoj kaj landoj.

Nigra-osta koko, aŭ alinome nigra koko estas unu el la raraj birdoj speciale produktitaj en Ĉinio. Ĝi havas eksterordinaran aspekton: blankaj veluraj plumoj, bluaj oreloj, lanugaj gamboj, blankaj lanugoj sub la beko kaj blanka velura bulo sur la kapo. Kaj pro tia bulo oni nomas ĝin ankaŭ "blanka fenikso". Kaj ĝiaj haŭto, ostoj, karno, lango kaj graso, ĉiuj estas nigraj, tial la pilolo ricevis la diritan nomon.

Ĉinio havas longan historion en kuracado per nigra-osta koko. La ĉina farmakologo Li Shizhen (1518-1593 p.K.) de Ming-dinastio (1368-1644 p.K.) registris en sia fama verko "Kompendio de Droga Medicino" (Ben Cao Gang Mu) la recepton de medicinisto Meng Xi de Tang-dinastio (618-907 p.K.) pri kuracado per nigra-osta koko. Tio pruvis, ke oni prenis nigra-ostan kokon

kiel kuracilon jam antaŭ Tang-dinastio. Laŭ la klasika medicina verko de Ming-dinastio "Longigo de la Vivo kaj Protekto de la Sano", la blankfeniksa pilolo estis panaceo por virinaj malsanoj, uzata nur de la reĝinoj kaj imperiestraj kromedzinoj. Resuminte la klinikan sperton de la antaŭuloj, la Imperiestra Hospitalo de Qing-dinastio (1644-1911 p.K.) reviziis la recepton kaj donis la nomon de la Peking Pai Feng Wan. Tongrentang, la Qing-kortega apoteko, estis taskita fari la pilolon el elektitaj drogoj. Kaj hodiaŭ, oni ankoraŭ konservas la originalan tradician teknologion en la produktado de tiaj piloloj, tiel ke ili estas kun brile nigra koloro, subtila kvalito kaj bonaodoro kaj sen rekremento. Tial ĝi estas bona medikamento kaj kara donaco al amikoj kaj parencoj.



Kion diras alumeto al la cigaredo?


Alumeto al la cigaredo diras: Mi por vi perdas la kapon.

FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ

Antaŭ Ŝtormo
de usonano **Reginald T. Harling**



Kintai-ponto, Iúakuni, Hongŝu
de japano **Fusacugu Kido**





Muzikistaro

Mita fluganta ĉevalo



Freskoj
en Antikva
Nobela Tombo
de Okcidenta
Liang-regno



Portreto de la enterigito



Fluganta virino

Festeno





8152

